SPECIALA NUMERO

XVIa Universala Kongreso de Esperanto WIEN VIENO
Loka Kongresa Komitato

ESPERANTO ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.
Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:
D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, Bucureşti
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikdirektoro, Kaunas.

N-o 195
8. 6. 1924

Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj: H. Jung kaj M. Butin, L. K.
Administracio:
Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo
po numero egalvaloro de 0,06 dolaro aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto suferis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj landoj 0,05 dol. aŭ 0.25 sv. fk.

Anonceprezo
po kvadrat-centimetro egalvaloro de 0.20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0.15 sv. fk.), en „Internacia Komerco“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, Bucureşti, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

XVI-a Universala Kongreso de Esperanto 1924 en Wien

6—14 aŭgusto.

Ĝia aranĝo kaj ĝiaj amuzoj. — La fakaj kunsidoj. — Esperanta ekspozicio. Ekzamenoj pri Esperanto. — Sciindaĵoj.

Jam ne ŝajnas necese, alvoki denove ĝenerale la popolon el Esperantujo al la centro de ĝia nunjara kunveno, al la kongresejo Wien. La ĉiutage alvenantaj aliĝoj garantias al la L. K. K. la esperatan sukceson; la listo de la kongresanoj kreskas ĝojige per sinanoncoj el ĉiuj partoj de la terglobo, kaj oni jam nun povas esti certa, ke al la urbanaro de Wien estos prezentata reprezentantaro ĉiunacia en multaj miloj da „ekzempleroj“. Tial la L. K. K. nun submetas ĉi tie al la partoprenontaj je la Deksesa sian programon por tiu unua grandurba kongreso. Nur per skizaj konturoj tio estas farebla momente; tamen ĉiu leganto povos el ili imagi, kio lin atendos en Wien.

La spertoj el la ĝisnunaj universalaj kongresoj de Esperanto instruis pri tio, ke laŭ la kutima aranĝo laboremuloj kaj amuzemuloj iom malhelpis unu la aliajn. Por malhelpi tiun malhelpon la L. K. K. por la Deksesa decidiĝis, la unuajn tri tagojn de la kongreso dediĉi ĉefe al la laboro — sed ne sen amuzoj — kaj la lastajn tri ĉefe al amuzoj — sed ne sen laboro. La supro estu en la mezo: granda manifestacio por Esperanto laŭ la stilo de ĝisnuna solena kongresmalfermo.

La unuaj tri labortagoj de la kongreso do nur per interna ceremonio estos malfermataj. Dum ili la grandaj publikaj laborkunvenoj por la tri lastaj kongrestagoj estas preparataj kaj ankaŭ la diversaj fakaj kunsidoj okazos dum tiuj tri unuaj tagoj. Sed la laborkunsidoj nur antaŭtagmezo aŭ, laŭplaĉe, dum du aŭ tri horoj posttagmeze plenumos siajn taskojn, ĉar dum la varmega aŭgusto labori dum pli ol ses horoj, estus turmento. Tial ĉiu vespero ankaŭ de tiuj tri labortagoj donos sufiĉajn eblojn por amuzoj. La nelaboremuloj dum la tuta tago povus studi la multegajn vidindaĵojn de nia mezeŭropa metropolo, gvidotaj per la aŭstraj samideanoj.

Provizora programo.

Okazos laŭ la provizore fiksita programo de la Deksesa:

La 6 aŭgusto, vespere, salutkunveno por la alvenantaj eksterurbanoj, kiuj estos akceptataj en la stacidomoj en Wien kaj trovos komplete funkciantan kongresaparaton pri loĝejoj, manĝejoj ktp.

La 7 aŭgusto post preparaj kunsidoj de la kongreskomitatoj je la 10 h. solena internacia malfermo de la Deksesa, proklamo de la internaj laboroj, posttagmeze laborkunsidoj aŭ promenadoj tra la urbo kaj vespere la unuaj malgrandaj, sed bone preparitaj amuzoj por la laboremuloj kaj la aliaj amikoj.

La 8 aŭgusto antaŭ- kaj posttagmeze fakaj kunsidoj, kiuj preparas raportojn, proponojn kaj rezoluciojn por la kongreskomitato, uzotaj laŭeble en la ĉefkunsidoj de la 11, 12 kaj 13 aŭgusto. Promenadoj laŭvole. Vespere denove amuzoj.

La 9 aŭgusto finiĝo de la fakaj kunsidoj, lastaj preparaj kunsidoj de la kongreskomitatoj, elekto de la naciaj reprezentantoj kaj de la fakaj raportontoj. Vespere granda kunveno solena de la gaja kongresanaro en la ampleksa kongresejo.

La 10 aŭgusto post ankoraŭ necesaj lastaj preparaj kunvenoj, je 11 h. la publika manifestacio de Esperanto antaŭ honorgastoj, laŭ grandstila, zorge preparita detala programo, en ĝia formo novaĵo por la tutmonda esperantistaro kongresoin vizitanta; posttagmeze agrablaj ne lacigaj aranĝoj, vespere grandstila fest-koncerto, krom tio kabaredoj kaj diversaj aliaj amuzoj.

La 11 aŭgusto daŭrigo de la salutoj de naciaj kaj fakaj delegitoj, se eble, jam raportoj, tre mallongaj koncizaj; koncerto, vespere teatro, samtempe aliaj elektitaj amuzoj.

La 12 aŭgusto daŭrigo de la raportoj kaj proponoj, eble ankaŭ gravaj paroladoj; posttagmeze kaj vespere ekskursoj, koncerto, spritaj lumbildparoladoj, teatro, kabaredoj naciaj kaj internaciaj ktp.

La 13 aŭgusto antaŭ la solena sed denove interna fermo de la kongreso proponoj, deziroj kaj decidoj prezentataj al la kongresanaro, posttagmeze kaj vespere laŭ speciala, riĉa programo familiara adiaŭa kunveno, ĝardenfesto.

La 14 aŭgusto ekskursoj.

Laŭ tiu programo la laboremuloj ĉi tiun fojon havos pli da tempo por siaj celoj, kaj la tempo por amuzoj estos pli liberigata de okupo per laboro. La L. K. K. havas la certecon, ke tia aranĝo plaĉos al ĉiuj kaj estos modela por la sekvontaj kongresoj; certe, la efiko decidos, kaj la plej grava efiko estas esperota de la granda publika manifestacio la 10 aŭgusto antaŭtagmeze kun tuta ĝia soleneco.

Kelkaj vortoj estu diratai ĉi tie ankaŭ pri aliaj eble dubaj punktoj por kelkaj kongresanoj, ekz. pri la vesto. La sezono, la longdaŭra por multaj kongresanoj vojaĝo, la maloportuneco, kunporti grandan pakaĵon devigas rekomendi toleremon tiel, ke la frakoj kaj similaj festvestoj ne estu postulataj, almenaŭ ne de la eksterlandaj kongresanoj. Ili sentu sin neniel ĝenataj, amikaj gastoj, vojaĝantoj dumsomeraj, sen la devo, nepre obei ĉiujn postulojn de etikedo kaj ŝarĝi sin per senbezonaĵoj; neniu el la preparataj solenaj kaj amuzoj kunvenoj estos fermata al gastoj, kiuj ne surhavas „festlivreon“.

El diversaj landoj venis sciigo, ke ankaŭ por la vizito de la Deksesa „karavanoj“ estas aranĝataj. Unu el ili kolektos la okcident- kaj sudokcident-eŭropajn kongresanojn en Svislando por komuna vojaĝo al Wien, alia venigos la balkanajn amikojn, tria la sud-germanajn XVI-anojn surŝipe el Passau sur la Danubo per tre agrabla veturado al la kongresurbo, ankaŭ el la nord-orientaj landoj karavanoj alvenos k. a. Ekzistos do okazoj por diversnaciaj kongresanoj, interkonatiĝi jam survoje por ĝui kune la agrablaĵojn de „lingva interkonsento“ kaj ekzercadi la lingvon ĝis perfekteco de ĝia uzado dumkongresa.

Por ebligi aliĝon sen altigo de la prezo por la kongreskarto la L. K. K. decidis, ke ĝis la **31 majo** la prezo de la kongreskarto restas ĝenerale ne altigita, sed la kotizo nun estas **5 sv. fk.**, anstataŭ 2,5 sv. fk. Vidu la kotiztabelon.

La artaj invitiloj plue estos dissendataj laŭ speciala mendo de interesuloj; cetere sufiĉos letera aliĝo laŭ la jam konigitaj kondiĉoj. Pri la difinaj prezoj por loĝado kaj manĝado, por teatro kaj aliaj aranĝoj momente ankoraŭ certaj detaloj ne estas direblaj. Ĝustatempe ankaŭ tiuj demandoj estos respondataj kontentige por ĉiuj. Neniu timu tro grandajn elspezojn, ĉar ĉio estos aranĝata laŭ ĉies deziroj kaj pagebleco. La XVI-a ne nur por riĉuloj estu okazo, partopreni kelktagan vivon en Esperantujo. La viveblo en Wien ne estas pli multekosta ol alilande en grandaj urboj.

Post la sciigo pri la intencata ordo de la kongresaranĝo ni nun parolu ankoraŭ iom detale pri:

La amuzoj.

Oni povas kompreni, ke urbo, kia estas Wien kun sia renomo pri ĉiaspeca spirita kulturo, siaj ĉiuartaj vidindaĵoj, sia senrivala ĉirkaŭo ebligas al vizitantoj, kiuj en nia kongreso pli serĉas okazojn por travivi gajajn horojn kaj deziras esti ne fremdaj en fremda urbego, sed meze inter bonaj geamikoj el ĉiuj terpartoj, prezenti tre variajn amuzojn. Kaj ankaŭ tiuj kongresanoj, kiuj dum la tagoj de la kongreso serioze laboradis por ĝeneralaj aŭ specialaj celoj ligitaj kun nia lingvo en la komunaj aŭ en fakaj kunsidoj, kompreneble deziros malstreĉi siajn nervojn, iom lacigitajn de spirita penado, per ĉeesto en iu amuzejo, kie ili povas ĝui plezurojn por siaj okuloj kaj por siaj oreloj.

La ĉefe videmajn gekongresanojn oni celas zorge kaj klarige gvidi pogrupe tra la urbo, tra ĝiaj novaj kaj malnovaj stratoj kaj placoj rigardindaj el iu, historia aŭ alia, vidpunkto, atentigante pri rimarkindaj objektoj (konstruaĵoj, monumentoj, muzeoj kaj a.), de kiuj la urbo Wien ja estas riĉega. Kaj, ĉar certe multaj el niaj karaj amikoj alilandaj sopiros, dum la kredeble iom varmegaj aŭgustotagoj ĝui freŝan aeron ekster la domarego, ankaŭ ekskursoj estos aranĝataj en la pli malpli proksimaj ĉirkaŭan regionon, ekskursoj piede aŭ per tramvojo al la belegaj ĝardenegoj kaj arbaroj atingeblaj post mirinde mallonga vojaĝo, ekskursoj per speciale disponigotaj vagonaroj aŭ ŝipoj al interesaj kaj fame konataj proksimaj lokoj, montoj k. c. kun agrabla halto por refreŝigo kaj ripozo. Kaj reveninte post tiaj ekskursoj, ili ĉiuj vespere trovos diversajn okazojn por ripozante amuziĝi laŭ la maniero en Esperantujo. Ni ne parolas nur pri la salutvesperoj la 6 aŭgusto kaj pri la malgrandaj amuzaranĝoj por laboremuloj dum la vesperoj de la 7 aŭg. kaj de la 8 aŭg., pri la projektata granda kunveno vespere la 9 aŭg., pri gajaj lumbildparoladoj vespere de la 12 aŭg., sed ankaŭ, kaj ĉefe, ni mencias pri koncertoj diversaj, kabaredaj prezentadoj naciaj kaj internaciaj, la teatraj prezentadoj kaj, kiel lasta, la ĝardenfesto finonta per agrablega impreso la tagojn de nia Deksesa.

La teatraj prezentadoj.

Intence la Loka Organiza Komitato ankaŭ tiurilate forlasis la ĝisnunan kutimon, dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto prezentigi tragedion, kiom ajn grava kaj valora ĝi estu en nacia literaturo. La pezaj paŝoj de tiaj klasikaĵoj tro premas la animojn, la korojn kaj la nervojn de aŭdantaro, iom laca de dumtagaj diskutadoj kaj promenadoj kaj dezirante amuzon, malstreĉon, liberigon de moralaj konfliktoj, eĉ kiam ili estas kvazaŭ solenigitaj de majstra poeto de mirinde belsonaj versoj. Ne en tia senco klasikan verkon por teatro volis ludigi aŭ reludigi la organizantoj de la Deksesa, sed, kvankam plenvaloran, tamen serenan. Kaj ĝi estu karakteriza por la popolo, kiu gastigas la tutmondan esperantistaron, ĝi komuniku al la alilandaj, eŭropaj kaj ekstereŭropaj amikoj ĝustan imagon pri la pensmaniero, la sentimentoj, la bonhumoro, la sprito iom morda, la bonkoreco, pri ĉiuj ecoj, pro kiuj la Wien'anoj estas laŭdataj aŭ priridataj.

Por prezenti ĉion tion kune al homoj scivolaj pri la „karaktero de popolo", kiun ĝis nun ili povis ekscii nur el okazaj legaĵoj, gazetraportoj k. s. kaj eĉ dum kelktempa restado inter la popolanoj ne povus sperti ĝisfunde pro la fremdeco de la lingvo, ekzistas modelo en la teatra literaturo elkreskinta el tiu sama fundo. Ferdinando Raimund (1791—1836), naskiĝinta en Wien, helpanto de sukerajisto kaj tiam fariĝinta la plej ŝatata siatempa aktoro, verkis teatraĵojn, kiuj en la formo de sorĉfabeloj postulata de la tiutempa gusto de la publiko defendis iun moralan tendencon ornamitan per belegaj floroj de fantazio, per fruktoj de iom melankolia bonhumoro ridetanta inter larmoj, kaj per kiuj li entuziasmigis ne nur siajn samtempanojn sed ankaŭ la posteularon pripenseman. Unu el tiuj teatraĵoj estis elektata por prezentado al la internacia kongresanaro. „La Malŝparulo", la plej matura el la komedioj de Raimund, skribita de li dum 1833. Ĝi havis kaj havas sukceson, kiam ajn ludata en nia aŭ en eksteraj landoj, do, ni povas esperi, ke ĝi plenkontentigos ankaŭ la aŭdantaron el ĉiuj nacioj, al kiu ĝi estos prezentata de geaktoroj tute lertaj kaj spertaj, ne de diletantoj. Bonaj akteroj kaj aktorinoj el la multaj valoraj teatroj en Wien prenis sur sin la taskon, lerni kaj ludi tiun teatraĵon, kiu postulas proksimume tridek personojn. Kun ĝojiga fervoro ili nun lernas en speciala kurso nian lingvon, kaj jam ekzistas por ili aliaj roloj, ĉar la verko de Raimund majstre estas tradukita de unu el niaj plej spertaj pri literaturo esperantistoj, de la ekskolonelo Francisko Zwach, kaj la libro jam post ricevo de tiu ĉi numero aperis presita en la eldonejo de F. Hirt & Sohn en Leipzig ĝustatempe por tiuj, kiuj krom aŭdado volos havis la daŭran ĝuon de legado kaj relegado de tiu gravenhava teatraĵo. Ĉi tie do nenio estu sciigata pri la enhavo mem, pri la figuroj kaj pri la konfliktoj, kiuj komplikas ilian vivon; dum du sinsekvaj vesperoj la kongresanoj havos okazon, en unu el la plej agrablaj teatroj de Wien, proksima al la kongresejo, kompati la malŝparulon Flottwell, koleri pro la malica ĉambristo Wolf (lupo), ridi, tamen kortuŝite, pri la lakeo kaj posta lignaĵisto Valentin kaj pri lia amata Rozinjo, admiri la feinon Keristano ktp Kaj ili eliros el la teatro kun impreso pri la ecoj de la Wien'anoj kaj entute de la veraj aŭstroj pli ĝusta ol havigebla al ili per longa disertacio, ĉar el la vortoj kaj el la kantoj ilin alparolis la koro de la popolo . . .

La ĝardenfesto.

La L. K. K. en Wien opinias, ke la simpla adiaŭo post lasta laborkunsido ne sufiĉas por la disirado de granda frataro, diranta „ĝis revido" sed ofte ne revidanta unu la alian. Pro tio por la lasta oficiala tago de la Deksesa alia grandstila kaj agrabla aranĝo estas intencita: vespera ĝardenfesto, proksime de kastela palaco Schoenbrunn, kies belega kaj grandega parko en la stilo de tiu de Versailles iam antaŭ pro la historio fama teritorio povos allogi multajn vizitantojn el la kongresanaro. Ili post agrabla posttagmeza promenado en senpolva kaj senfulga aero, eble post vizito de la pompaj salonegoj en la antaŭe imperiestra somerpalaco, aŭ de la interesaj zoologia parko kaj botanika ĝardeno en la parko, venos per kelke da paŝoj vespere sur deklivan herbejon kun granda restoracio, pavilonoj ktp., kaj tie al ili estos prezentata la propra al Wien amuza vivo: kantoj de la popolkantistoj, muziko de kvarteto trovebla kutime en la Heŭrigen-trinkejoj (Heurigen = vino samjara), spritaj paroladoj kaj ĉiuspecaj refreŝigiloj manĝeblaj kaj trinkeblaj. Kaj dum tio ili estos en Esperantujo, ne en iu al ili fremda urbo. Eĉ subita pluvo ne povos malhelpi tiujn amuzojn, ĉar la pavilonoj donos sufiĉan spacon por rifuĝo. Sed, se la vetero restos bela, multkoloraj lampionoj heligos la somernokton malluman kaj post horoj kaj horoj de bonhumora gajeco tramvojaj vagonaroj revenigos la „noktobirdojn" hejmen en la urbon por sufiĉe ripozi antaŭ la reveturado en aliajn landojn

Tiu festa vespero anstataŭos la alifoje kutiman internacian kostumbalon, tamen ne malpermesante okazajn Shimmy, Java, Foxtrot kaj aliajn modernajn kaj kompreneble ankaŭ la efektivajn Wien'ajn valso-dancojn. „Ĉe belega blua Danubo" la konata en la tuta mondo valso de la majstro Strauss kaj aliaj dancmelodioj alloge salutos la gedancemulojn, al kiuj, same kiel al la cetera ĉeestantaro, la naciaj popolkostumoj de Aŭstrujo estos prezentataj.

Ne, neniu povos bedaŭri partoprenon en la Deksesa, neniu, kiu estos estinta en Wien dum la tagoj de la 6 ĝis 15 aŭgusto; li portos kun si hejmen alian krom la bona rememoro pri tiu tempo travivita en gastama urbo inter gastigemaj samideanoj feliĉaj, ke li povos rakonti al sia samurbanaro, kiel efektive devas aspekti interpopola fratiĝo. Kiu ankoraŭ ne povis decidiĝi, ĉu li veturos al Wien por la XVI-a Universala Kongreso de Esperanto 1924, tiu nun forpelu ĉian heziton kaj dubon kaj ne prokrastu plu la sinanoncon. Ne estas ankoraŭ tro malfrue por fari tion, tamen ankaŭ vi deciduĝu baldaŭ kaj ĝojigu la Lokan Kongresan Komitaton per via aliĝo, kiun ĝi nepre atendas.

Wien, dum aprilo 1924.

La Loka Kongresa Komitato en Wien

Joh. Schröder, prezidanto. *Franz J. Schade*, ĉefsekretario.

Trafika bildo de l' Schwarzenbergplatz.

Fakaj kunsidoj.

Adresaro de la organizantoj,

al kiuj la samfakuloj bonvolu turni sin per laŭbezone speciala sinanonco pri partopreno, proponoj, konsiloj, fakaj aranĝoj ktp.

Akademianoj: S-o D-o A. Minibeck, Wien III, Ungargasse 4.

Alternejaj studentoj: S-o A. Mildwurf, Wien XVI, Thaliastrasse 12/8.

Bahaistoj: S-o Friedrich Gerstner, instruisto, Karlsruhe-Rintheim, Baden, Germanujo.

Bankoficistoj: S-o R. Čech, Wien IX., D' Orsaygasse 7.

Biblio- kaj traktatsocieto „Garda Turo": s-o A. Egg, Rieden, Baden, Svisl., Landstr. 277.

Bontemplanoj: S-o D-o J. Longo, Mödling apud Wien.

Farmaciistoj: S-o J. Wagner, mag. farm., Graz. Kalchbergg. 10.

Fervojistoj: S-o H. Steiner, Bisamberg 248 apud Wien.

Filatelistoj: S-o J. Kolnhofer, Wien XIII, Zehentnergasse 37

Fotografistoj: S-o A. Reiss, Wien IV., Wiedner Hauptstr. 24.

Framasonoj: S-o K. Barthel, Frankfurt a. M. (Germ.), Wöhlerstrasse 14.

Instruistoj: S-o J. Hörl, Wien, XVI, Wattgasse 57.

Junuloj: S-o A. Warkany, Wien, II, Hochedlingerstrasse 17.

Katolikoj: S-o V. Kasmader, Wien, XVIII, Herbeckstrasse 92.

Komercistoj: S-o R. Hoschek, Wien, XVII, Müglendergasse 6.

Komerc-oficistoj: S-o A. Oberrotman, Warszawa (Polujo), Krak. Przed. 10.

Kristanoj: S-o P. Hübner, Quedlinburg i. O. (Germ.), Bergstraße 1.

Liberpensuloj: S-o P. Gutt, Wien XVII, Pelzgasse 8-12.

Pacifistoj: S-o R. M. Frey, Wien III, Bechardgasse 14.

Policistoj: S-o H. Hirz, Wien XVIII, Schopenhauerstrasse 60.

Poŝtistoj: S-o D-o E. Spielmann, Bern (Svislando), P. K. 174, Transit.

Psikistoj: S-o L. Gube, Berlin-Friedenau (Germ.) Fregestrasse 26.

Ruĝa Kruco: S-o M. Wortmann, Wien, III, Radetzkystrasse 1.

Tabakkontraŭuloj: S-o D-o A. Hloucha, Wien XVIII, Semperstrasse 36.

Teozofoj: S-o O. Schoenemann, Graz (Aŭstrujo), Schulgasse 1.

Tramvojistoj: S-o K. Wessely, Wien, XII, Steinhagegasse 3.

Vegetanaroj: S-o O. Bünemann, Hamburg-Fuhlsbüttel (Germ.), Alsterkrug-Chaussee 586.

Virinoj: S-ino St. Müller, Wien, II, Rotesterngasse 22.

Instrukciaro

por preparo kaj aranĝo de fakkunsido.

1. Faka kunsido — ekz. de sciencistoj, filatelistoj, katolikoj — estas nomata ĉiu speciala kunveno sub estraro elektita por ĝi kun preciza tagordo pro certa profesia intereso aŭ pro ia kultura celo aŭ pro demando pri organiza faka laboro. Tia kunsido donu ankaŭ okazon, interrilatigi laŭfake kunvokitajn aŭ hazarde alvenintajn samfakajn kongresanojn, se eble, kun ne-esperantistaj samfakuloj.

2. La sola oficiala traktad-lingvo estas Esperanto.

Salutado en la lingvo de kongreslando estas permesata, kondiĉe, ke ĝi tuj estas tradukata en Esperanton. La organizanto kaj la kunsida projekto devas esti aprobataj de la L. K. K. kaj de la K. K. K.

3. Organizanto povas esti persono — laŭeble el la kongresurbo aŭ lando — kiu laŭsperte garantias seninterrompan laboremon, sufiĉan kapablon laŭ faka vidpunkto kaj ankaŭ scipovas Esperanton.

4. La organizanto zorgu pri tio, ke la kunsido ebligu ne nur taŭgan fakan laboron sed ankaŭ bonan propagandon por Esperanto en la rondo de ne-esperantistaj samfakuloj, por disvastigi aŭ fortigi en ĝi la praktikan uzadon de Esperanto.

5. La celoj de la fakaj kunsidoj povas esti:

a) prilabori komunajn aferojn, celojn aŭ taskojn en la propra fako;

b) ebligi aŭ plifaciligi dezirindajn interrilatojn en la tutmonda samfakularo;

c) aranĝi fakajn referatojn aŭ paroladojn dum la kunsido aŭ propagandkunvenojn por samfakuloj ne-esperantistaj;

d) aranĝi komunajn vizitojn de por la samfakuloj valoraj vidindaĵoj (bibliotekoj, fabrikejoj, hospitaloj, muzeoj k. c.);

e) krei aŭ subteni internacian organizon de samfakuloj sur la neŭtrallingva fundamento de Esperanto.

6. La por iu faka kunsido respondeca samideano (organizanto) devas, interkonsente kun la L. K. K., zorge interrilati kun:

a) samfakaj esperantistoj, kiuj jam aliĝis aŭ certe aliĝos al la ĵus preparata kongreso;

b) samfakaj esperantistaj rondoj, societoj k. c., kiuj iamaniere povus subteni la projekton;

c) ne-esperantistaj samfakuloj aŭ samfakaj organizoj en la kongres-urbo aŭ -lando, kiuj povus plivalorigi la aranĝon aŭ ebligi dezirindan sukceson.

7. La organizanto de kunsido ne estu devigata akcepti la prezidantecon en la kunvenoj; kontraŭe, li preparu sufiĉe frue imponan reprezentantaron, li antaŭzorgante certigu al si lertajn parolantojn, kiuj bone konas la intencojn laŭ la programo de la kunsido, entute li zorgu pri tio, ke la plej taŭga, kapabla, eminenta kaj honorinda estraro estu elektata, al kiu apartenu diverslandanoj.

8. La organizanto laŭeble certigu ankaŭ ĉeeston de honorgastoj el la rondo de ne-esperantistaj samfakaj eminentuloj, sed tre zorge pripensante ĉiun tian paŝon laŭ la amplekso de la aranĝo kaj laŭ la vera graveco de la certe kaj bone realigebla programo. — Ne invitu senkaŭze! Ne troigu la okazontaĵojn! — Parolu tre singarde pri la nombro de fakkunsidanoj aŭ kongresanoj!

9. La programo de la solena faka ĉefkunveno enhavu:

a) salutadon per la organizanto aŭ alia estro, eble laŭaĝe elektita;

b) bone preparitan — ne lasitan al hazardo — elekton de prezidantaro;

c) malfermon de la kunsido per la prezidanto kaj gastsaluadon;

d) referatojn tre frue kaj bone preparitajn;

e) tagordon laŭ punkto 5-a de ĉi tiu instrukciaro.

10. La respondeca organizanto de fakkunsido frue prizorgu, interkonsente kun la L. K. K., ke estu je dispono:

a) kunvenejo por la senkondiĉe necesa prepara kunsido de la aranĝanto kun kelkaj samfakaj eminentaj samideanoj;

b) sidejo sufiĉe granda kaj inda por la ĉefkunveno, — kelkfoje estos preferinda la kunvenejo regule uzata de la samfakanoj en la kongresurbo;

c) sidejo por la faka esperantista ne publika fakkunsido.

11. La fakkonferenca estraro elektu lertan kaj spertan protokoliston, eĉ helpanton de tiu, kapablajn memstare kaj rapide redakti, sed ankaŭ legeble skribi kompletan, precizan, ĝustegan kaj koncizan raport-protokolon, subskribotan de la protokolanto kaj la prezidanto, por tuj transdoni ĝin al la raport-sekretario en la kongresa oficejo.

12. La rezultatoj el la fakaj kunsidoj aŭ la fruktoj de la tuta fakkunsida laboro; la plej gravaj faktoj, decidoj, rezolucioj, proponoj k. c., devas esti tuj transdonataj skribe kiel resumo aŭ ekstrakto el la protokolo al la kongresa prezidantaro, por laŭeble uzi la materialon inter la komunikoj en ĝenerala kunsido de la kongreso, per simpla estrara sciigo aŭ per faka referanto kaj por publikigi ĝin per faka kaj ĉiutaga gazetaro aŭ por alimaniere utiligi la rezultojn en speciala kongresa raporto.

Al la ĉefaj organizaĵoj kaj al la helpemuloj en ĉiuj landoj.

Pri naciaj informejoj dum la Deksesa en Wien.

Tre estimataj samideanoj!

Kiamaniere oni povus plifaciligi kaj plifortigi la interrilatojn de la tuta kongresanaro en speciala direkto? Per naciaj informejoj!

Ĝenerala kongresa informejo kompreneble ekzistas. Sed estus dezirinde ankaŭ informejo por kaj pri ĉiu lando, kiu per sufiĉe granda nombro de kongresanoj estas reprezentata. Provon ni ebligos dum la Deksesa en Wien.

La aranĝo komencos jam en la naciaj kunvenoj, kiuj elektos la naciajn reprezentantojn por la kongresa estraro kaj saluado.

Dum la nacia kunveno oni ankaŭ elektu almenaŭ tri personojn, pretajn kaj taŭgajn por doni ĉiujn informojn pri la koncerna lando mem, la esp. movado en la lando, la gazetoj kaj libroj, sed ankaŭ por peri inter la kongresanoj sciigojn kaj dezirojn. — La L. K. K. disponigos specialan sidejon kun bezonata materialo, literaturo, bildoj, flageto nacia, landnomo, korespondlibro k. c. —

Iu nacia informanto, kiu bone scias la Esp.-lingvon, ĉeestu ĉiutage dum preciza horo.

Tiu, kiu deziros renkonti alilandanon aŭ komuniki ion al iu, tiu uzu la nacian informejon.

Eble estas samideanoj aŭ societoj, kiuj deziras plibeligi kaj pliriĉigi la propran informejon. — Ili sendu tuj, almenaŭ ĝis 30 junio, taŭgajn literaturaĵojn, bildojn aŭ ornamaĵojn al la L. K. K., sed senkondiĉe, ambaŭflanke sen ia garantio.

Invitoj.

Kelkaj el la cititaj aranĝantoj de fakaj kunsidoj jam dissendis alvokojn aŭ invitojn al la samfaka aŭ samcela samideanaro.

Altlernejaj studentoj.

Invito al internacia fakkunsido dum la Deksesa.

La 7 ĝis 14 aŭgusto 1924 okazos en Wien la XVI-a Univ. Kongreso de Esperanto kaj inter la eksterlandanaj kongresontoj certe estos multaj studentoj.

La Akademiana Societo Esperantista en Wien decidis, aranĝi fakan kunsidon por esperantistaj kaj ankaŭ neesperantistaj studentoj, dum kiu oni diskutos pri la valoro de Esperanto por studentoj kaj ĝenerale por la studado. Krome okazos paroladoj pri studentaj demandoj kaj pri sciencaj temoj. La kunsidoj okazos en la fest-salono de la Universitato.

Ĉiu, kiu deziras paroladi laŭ la provizora programo, skribu al kolego: A. Mildwurf, Wien XVI, Thaliastr. 12-8.

La kolegoj eksterlandaj jam nun estas petataj sciigi dezirojn kaj opiniojn pri la projektita kunsido kaj ĝia pliriĉigo. La tasko de la aranĝantoj estas kolekti, ordigi kaj prilabori la proponojn, prepari kunvenojn, prizorgi agrablan restadon dum la Deksesa kaj helpi laŭeble ĉiamaniere al la eksterlanda esp. studentaro.

La konferenco utilos al la partoprenontoj des pli, ju pli aktive kunlaboras ĉiu kolego.

La esperantistaj studentoj en Wien esperas, ke la konferenco estos multnombre vizitata ne nur de niaj kolegoj, sed ankaŭ de aliaj akademianoj, kelkfoje dezirindaj honorgastoj, kiuj estas kompetentaj pri diversaj aferoj. Tiamaniere la kunsido donos per reciproka helpo vekigon al ni mem kaj espereble ankaŭ instigon laŭ niaj komunaj intencoj al la dezirindaj rondoj en ĉiuj landoj.

Kolegan kaj samideanan salutoon!

Akademia Societo Esperantista Wien.

Katolikoj.

Karaj katolikaj samcelanoj.

Laŭ la decido de „Nia Oka“ 1923 en Nürnberg „Nia Naŭa“ okazos dum la nuna jaro de 6 ĝis 9 aŭgusto en Wien.

El tiu ĉi bela urbo nun alvokas la Loka Organiza Komitato de I. K. U. E. por la „Naŭa“ ĉiujn katolikajn fratojn kaj fratinojn, partopreni tiun katolikan kongreson esperantistan, ke ĝi fariĝu impona katolika manifestacio.

La kunsidoj de „Nia Naŭa“ okazos kiel faka kunsido en la kadro de la samtempa Deksesa en Wien; tial niaj kongresontoj povos utiligi al si la agrablaĵojn de la grandstile preparata XVI-a (malaltigo de la feryojprezo, loĝado, ekskursoj, amuzoj ktp.) kaj la Loka Organiza Komitato de I. K. U. E. ne postulas specialan kongreskotizon. Sed, ĉar la specialaj aranĝoj por „Nia Naŭa“ (programoj, insigno, Diservoj, katolika manifestacio, amuza vespero ktp.) kompreneble kaŭzos al la komitato sufiĉe grandajn elspezojn, ĉiuj karaj partoprenantaj estos petataj, per libervola donaco de almenaŭ la kvinona parto de la kotizo por la Deksesa, aparte finance helpi la Komitaton en ĝia ne facila tasko.

Tiaj donacoj ĉiam estas bonvenantaj kaj ili estas ankaŭ antaŭsendeblaj — eble tuj kune kun la aliĝo-deklaro — per monbiletoj en registrita letero al la sekretario de la Loka Organiza Komitato de I. K. U. E. por „Nia Naŭa“, s-o V. Kasmader en Wien, Aŭstrujo XVIII., Herbeckstrasse 92. — Se el ia rondo kelkaj karaj samideanoj intencas partopreni la katolikan Esperanto-Kongreson en Wien, ili bonvole sendu al la Loka Organiza Komitato de I. K. U. E. por ĉiu tia persono apartan, legeble skribitan aliĝdeklaron kaj informu ilin pri la donaceblo.

Informojn pri „Nia Naŭa“ vi, karaj samideanoj, ricevos pere de „Komunikoj“, la nuna oficiala organo de I. K. U. E., kiuj ĝis la kongreso eliros ĉiumonate.

Do, ni petas vin insiste, sendu baldaŭ viajn aliĝo-konsentojn kaj estu certaj, ke vi trovos la plej koran bonvenon en Wien!

Prof. prov. F. Meŝtan, ŝol. piar.,
prez. de I. K. U. E.
La Loka Organiza Komitato de I. K. U. E.
por „Nia Naŭa“:
prez. *Prof. V. Nedwid*, O. S. B., dekano.
sekr. *V. Kasmader.*

Provizora programo:

La 6 aŭgusto salut- kaj interkonatiĝa vespero.

La 7 aŭgusto antaŭtagmeze Diservo; posttagmeze malferma kaj 1. laborkunsido; vespere amuzoj.

La 8 aŭgusto antaŭtagmeze Diservo por la mortintaj samideanoj kaj 2. laborkunsido; posttagmeze 3. labor- kaj ferma kunsido kaj propaganda Diservo; vespere amuzoj.

La 9 aŭgusto antaŭ la manifestacia kunsido de la XVI-a solena Diservo.

Komercistoj.

Al la tutmonda komercistaro!

Ni invitas la tutmondan komercistaron al la konferenco komerca, projektata de la Gildo de la Wien'a komercistaro dum la XVI-a Universala Kongreso de Esperanto en Wien, okazonta la 7 kaj 8 aŭgusto 1924 en la festa salonego de la Komerca Ĉambro kaj en la domo de la K. Gildo.

Ĉiuj komercaj korporacioj kaj institucioj, firmoj kaj komercistoj kaj komercaj oficistoj jam uzantoj la lingvon Esperanto kaj emaj, uzi ĝin por serioza praktika laboro, estas petataj, nepre partopreni je tiuj ĉi speciale gravaj fakkunvenoj. Amikojn de nia intenco, kiuj persone ne povos partopreni, ni petas, sendi al ni atestojn de konsento aŭ aliajn dokumentojn valorajn por niaj klopodoj kaj laboroj.

Ĉiu komercisto sentu en si la devon kunlabori, por ke la komerca kunsido estu laŭeble grava, granda kaj sukcesplena!

La projektata programo de la komerca kunsido estas:

La 7 aŭgusto estas prepara kunsido de internacia komerca delegitaro, vespere komitataj fakkonferencoj.

La 8 aŭgusto fest-kunsido. Salutparolo. Paroladoj pri komercaj korporacioj kaj enkonduko de Esperanto kiel komerca helplingvo tutmonda, pri la komerca junularo kaj la instruado de Esperanto en ĉiu-rangaj komercaj lernejoj. Rezolucioj.

Dua ĉefa kunsido. Paroladoj pri tutmondaj interrilatoj de la komercistaro, uzanta aŭ uzonta Esperanton, per informoj kaj adresaro, pri internaciaj komercaj organizoj per-esperantaj, pri la komerca oficistaro kaj la studo de fremdaj lingvoj. Diskuto. Rezolucioj.

La 9 aŭgusto komercaj fakkunsidoj de agentoj, bankistoj, farmaciistoj, komercaj oficistoj. Diskutoj. Rezolucioj.

Helpemaj samideanoj anoncu sin propravole por paroladoj pri la cititaj temoj, por referatoj, raportoj, proponoj k. c. kiel eble plej baldaŭ sub la adreso: Komerca Kunsido dum la XVI-a Esperanto Kongreso en Wien, Aŭstrujo.

Pacifistoj.

Karaj geamikoj!

Dum la pasintaj jaroj okazis en la kadro de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto krom fak-kunsidoj ankaŭ bone vizitata kunveno de pacifistoj, dum kiu estis fondata la „Universala Esperantista Pacifista Ligo“ (U. E. P. L.), kies unua prezidanto fariĝis, kun entuziasmo de la ĉeestantaro, prelato D-o Aleksandro Giesswein el Budapest, unu el la eminentuloj de la pacifistoj kaj ankaŭ de la esperantistoj.

La tasko de U. E. P. L. estas la disvastigo de Esperanto, kiel neŭtrala kaj la plej facile lernebla lingvo, inter ĉiuj pacifistaj rondoj de la tuta mondo kaj disvastigo de la pacifisma ideo inter la esperantistaj rondoj. D-o Giesswein intencis aranĝi dum la nuna jaro okaze de la Deksesa la unuan kongreson de U. E. P. L., sed li mortis subite. Pro tio kaj, ĉar el la eksterlando alvenis sciigoj absolute ne kontentigaj, precipe pri la financa flanko, ne povos okazi dum aŭgusto la intencita kongreso de U. E. P. L.; ĝi devas esti prokrastata. Sed nur la kongreso, ne la programo. Anstataŭ kongreso okazos tute neŭtrala „Pacifista fak-kunsido“ en la kadro de la Deksesa, por plenumi la taskon de U. E. P. L.

Okazos unu pacifista ĝenerala kunsido, laŭeble granda — tio dependas de la eksterlando! — kaj krom ĝi po unu kunsido de la U. E. P. L.-estraro kune kun la ĉefkomisiitoj antaŭ kaj post la ĝenerala. Dum la konferenco ni devos elekti novan prezidanton, decidi pri taŭga estonta agmaniero (statutoj) kaj jam komenci la preparojn por la unua Kongreso de U. E. P. L.

Por ke ni havu sukceson, estas tre necese, ke ĉiuj niaj amikoj legu almenaŭ la ĉiusemajnan gazeton „Esperanto Triumfonta“. La sciigoj estos sendataj ankaŭ ĉiumonate al „Esperanto“ (Genève) kaj „Lumturo“ (Bremen).

Ĉiu ĉefkomisiito (ĉefdelegito, la nomojn kaj adresojn vidu en Esperanto Triumfonta n-o 155) bonvolu, same kiel ni, fondi landan pacifistan esperantistan societon, ĉar estas absolute neeble, havi U. E. P.-Ligon sen landaj societoj! Pro tio la Organiza Komitato de U. E. P. L. petas ĉiujn amikojn de la Zamenhofa pac-ideo, ke ili bonvolu helpi al la ĉefkomisiitoj ĉiamaniere, eĉ instigi ilin, fondi tiajn landajn societojn, treege bezonatajn de la Organiza Komitato de U. E. P. L. por la aranĝaj laboroj; anoncu almenaŭ per la aliĝilo por la XVI-a sian deziron pri la pacifista kunsido.

Postulu de ni avizilojn por la pacifista konferenco en Wien.

La Aŭstruja Pacifista Esperantista Societo
R. M. Frey,
Wien III, Bechardgasse 14/18.

Esperanto Triumfonta Wien

Ekzamenoj pri Esperanto.

Kune kun sia aliĝilo jam kelkaj partoprenontoj en la Deksesa sendis la demandon pri ebleco de ekzamenoj dum ilia restado en Wien. Ĉar ĝis nun bedaŭre en Aŭstrujo la ministro por instruaferoj estas ankoraŭ „atendema" rilate al Esperanto, ne ekzistas en tiu ĉi ŝtato oficiale aprobita komisiitaro pri ekzamenoj kaj la Loka Organiza Komitato pro tio rekomendas al kandidatoj por Esperanto-ekzamenoj, turni sin al la ekzamenantaro de la Internacia Instituto de Esperanto; adreso: UEA, 12 Bd. du théâtre, Genève, Svislando, kun propono, aranĝi dum la Deksesa en Wien ekzamenojn laŭ sia statuto. Laŭ petoj tiu instituto certe sendos al la kandidatoj ankaŭ ĝustatempe informojn pri la kondiĉoj plenumotaj por kaj dum la ekzameno. Cetere la Loka Organiza Komitato mem interrilatos kun tiu instituto pri ĉi tiu demando kaj informos interesatojn pri tio en sekvonta bulteno.

Aliĝo. Ĝis 15. 4. 24 aliĝis 2600 kongresanoj el ĉiuj eŭropaj landoj, ankaŭ el Afriko kaj Ameriko. Aliĝilojn oni afable postulu de la L. K. K. sub la adreso: Esperanto-Kongreso, Wien VI., Mollardgasse 55, aŭ sendu al tiu adreso simple skribe, en registrita letero, sciiganta la familio- kaj antaŭnomon, la loĝlokon kaj landon, almetatan propralandan monon laŭ kotiztabelo, sed ne diversspecan monon. La ĉekoj ĉiam kaŭzas grandan perdon de tempo kaj mono dum la banka procedo. Plej prefere estas monbiletoj (papermono), sendataj en poŝte registritaj leteroj.

Gvidado. Dum la tagoj de alveno en ĉiuj stacidomoj en Wien dejoras helpantoj aŭ samideanoj rekoneblaj per specialaj insignoj, kiuj donos informojn pri la vojo al la kongresejo. — Dum la kongrestagoj okazos grupgvidadoj al la vidindaĵaro en Wien, laŭ pripensita plano de spertaj kaj lingve lertaj samideanoj speciale sin preparintaj por tiu tasko.

Kongreskartoj estas dissendataj al la ĝis nun aliĝintoj. La sinanoncontaj kongresanoj ricevos ilin ĉiam tuj post alveno de aliĝo kun kotizo. — La kongreskarto estu bone konservota, ĉar ĝi estas legitimacio por ricevi rabaton (malaltigon de prezo k. c.) ĉe la pasporta oficejo kaj vojaĝbilet-eldonejo.

Kongreskotizoj. La kotizo estas por

Belgoj	50 frankoj
Britoj	20 ŝilingoj
Danoj	20 kronoj
Ĉeĥoslovakoj	50 kronoj
Finlandanoj	50 markoj
Francoj	50 frankoj
Hispanoj	25 pesetoj
Italoj	55 liroj
Nederlandanoj	10 guldenoj
Norvegoj	25 kronoj
Rumanoj	200 leoj
Svedoj	15 kronoj
Svisoj	20 frankoj
Usonanoj	4 dolaroj

Aŭstroj, Bulgaroj, Germanoj, Hungaroj, Jugoslavoj, Poloj, Rusoj, Ukrainanoj 5 sv.fk. aŭ 65 000.— aŭstr. kronoj. — Blinduloj aliĝas senpage.

Ĉiu sendu la kotizon en la mono de sia lando, el ĉi tie ne nomitaj landoj laŭ la valoro de 10 sv. fk. — Mendoj aŭ aliĝoj ne akompanataj de pago ne povos esti registrataj. — Favorkotizoj por familianoj ne ekzistas. — Repago de kotizo ne okazas. — La altigo de la kotizoj estas prokrastita ĝis la 31 majo. Sed por aliĝo post la 31 majo alvenonta la kotizo estas minimume 10 sv. fr. Do, ĉiu aliĝu tuj!

Kongreslibro enhavanta ĉiujn necesajn informojn pri la kongresaranĝoj (tagoj, tempo kaj loko de la kunsidoj, fakaj kunsidoj, amuzoj ktp.) kaj aldonon: Gvidlibro tra Wien, jam estas verkata. Ĝi enhavos ankaŭ anoncojn de firmoj, kaj la samideanoj-kongresanoj estas petataj, kolekti mendojn de tiaj anoncoj de sufiĉe gravaj kaj fidindaj firmoj pri diversaj vendaĵoj, ankaŭ de esperantistaj entreprenoj aŭ organizoj, gazetoj, eldonistoj ktp. kaj sendi ilin al: Esperanto-Kongreso, Wien, VI., Mollardgasse 55. La prezo de unu tuta paĝo en la kongreslibro, formato de la kongresa invitilo, estas 60 sv. fk., por duona paĝo 35 sv. fk.

Korespondoj: La L. K. K. povas respondi per aparta letero aŭ poŝtkarto nur tre urĝajn demandojn. Ĉiujn ĝenerale bezonatajn informojn por kongresanoj enhavos la esperanta gazetaro. Oni ne demandu, se ne ekzistas absoluta neceso por tio.

Loĝigo. Pri loĝigo ni ne donas specialan informon. Nuntempe enketo pritraktas tiun demandon, kaj ĉio estas tiel aranĝata, ke konforme al la mendo sur la aliĝilo ĉiu kongresano ricevos taŭgan loĝejon en hotelo, pensiono aŭ privata ĉambro je la plej eble modesta prezo, se tiaj estas deziratai La loĝadreson ĉiu kongresano ricevos post alveno en nia kongresoficejo en la kongresejo, kune kun ĉiuj ceteraj necesaj informoj, kongreslibro ktp. Tial la unua vojo el la stacidomo de alveno en Wien por ĉiu kongresano devos esti la vojo al la kongresejo en la centro de la urbo.

Manĝado. Same pri manĝigo informoj ne estas donataj. En Wien ĉiu kongresano povas sciiĝi, ĉu ekzistas okazoj por komuna tagmanĝo, kiuj gastejoj estas rekomendindaj ktp. Oni ordinare manĝas en restoracioj en Wien laŭ manĝaĵaro, ne laŭ menuo, elektante por si la deziratajn manĝaĵojn (ankaŭ laŭ la prezo).

Pasporto. Ĉiu eksterlanda kongresano bezonas pasporton vizotan en lia lando de la aŭstra diplomatia reprezentanto (Konsulo). Neniu forgesu,

La Kongres-Palaco.

postuli laŭ sia kongreskarto, prezentante ĝin, la konceditan rabaton de la vizoprezo. Nek envojaĝ-, nek restad-permeso estas bezonataj en Aŭstrujo kaj en Wien. La pasporto devas permesi envojaĝon de la 1 ĝis 10 kaj re- aŭ forvojaĝon el Wien de la 9 ĝis 20 aŭgusto.

Vojaĝo. La vojaĝo al Wien estas entreprenebla unuope aŭ kun „karavano". Ĉar en kelkaj landoj nur al karavanaj kongresvojaĝantoj estas koncedata rabato de la vojaĝbiletprezo, la L. K. K. rekomendas, sin turni la la ĉefa organizaĵo esperantista en la propra lando, kiu povas informi pri aranĝo de karavano. Jam estas anoncita al ni el diversaj landoj specialaj vagonoj aŭ specialaj vagonaroj, kolektantaj vojaĝantojn al la kongreso



Placo de Libereco kun Votiv-preĝejo.

el samlimaj landoj. Tra Aŭstrujo ankaŭ al unuopa kongresano estas koncedita rabato tiamaniere, ke bileto por simpla personvagonaro raitigas en la sama klaso veturi per rapid- aŭ D-vagonaro. Ankaŭ en Aŭstrujo, kun sama favoro, revojaĝo sur alia ol la vojo de alvojaĝo estas permesata.

Rememoraĵoj pri Wien.

En miaj manoj troviĝas la longe atenditaj kongrespropagandiloj: bela prospekto pri la urbo de nia Deksesa, aliĝilo ktp., kaj trastudante la mallongan priskribon de la estonta kongresurbo, mi denove travivas la belajn horojn, kiujn mi pasigis en junio 1922 en Wien. La ĉarma urbo kun ĝiaj artaĵoj kaj belega ĉirkaŭaĵo straras antaŭ mia spirita okulo!

Mi vagas tra la stratoj, la bela larĝa „Ring" (bulevardo) kun ĝiaj famaj konstruaĵoj, jen la urbdomo, jen la parlamento en nobla greka konstruarto! La operon, la kastelon, la belajn parkojn kaj monumentojn, ĉiujn mi salutas! — Tra malvastaj stratetoj subite la interna urbo estas atingita, kaj antaŭ miaj okuloj leviĝas la majesta katedralo de Sankta Stefano, kies famo ja estas mondkonata. La magazenoj en la ĉefaj stratoj kvazaŭ konkuras unuj kun la aliaj por montri al la pasantoj, kio signifas „Chique de Wien".

Kaj la tramveturilo nin rapide veturigas el la urba bruo en la verdaĵon! Ĉu al Nussdorf, ĉu al Sievering, ĉu al Heiligenstadt, ĉie nin ĉirkaŭas freŝa aero. Tra vinberejoj la vojo nin gvidas sur la Kahlenberg. Survoje vastaj herbejoj, dimanĉe la ripozejoj de la lacaj urbanoj, nin invitas al dormeto ĉe „patrino naturo". De sur la pinto ni ĝuas ĉarman vastan ĉirkaŭrigardon: La Wien-a arbaro kvazaŭ verda ondaro etendiĝas ĝis la horizonto, malsupre en la verdaĵo kuŝas la beletaj vilaoj de la antaŭurbetoj, kaj en la malproksimeco, meze inter la ŝtona maro de la urbo, la pinta turo de Sankta Stefano salutas nin. Pli ampleksa estas la rondrigardo iom pli alte, de sur la Leopold-monto. De tie ni povas vidi la multe prikantitan „belan bluan Danubon", kies akvo en multaj serpent-linioj kvazaŭ arĝenta rubando fluas tra la valo, kaj kasteloj kaj monaĥejoj kronas la bordojn. Ĉi tie, sur la altaĵo, ni tute forgesas, ke ni troviĝas en metropolo, en kiu pulsas la plej vigla vivo!

Sed reiru ni al la urbo! Por ĉiu muzikamanto Wien estas sankta tero, ĉar tie en la centra tombejo ja troviĝas en speciala parto la tomboj de niaj granduloj en la muziko: Strauss, Lanner, Suppé, Schubert, Schumann, Wolf, Brahms ktp. kaj — antaŭ ĉio — la plej granda geniulo: Beethoven tie ĉi eterne dormas. — Kaj iliajn eternajn verkojn oni ludas kaj kantas ĉie kaj ĉiam en Wien, la muzikcentro kun sia mondfama opero.

Ankaŭ tiu, kiu sopiras al gajeco kaj humoro, ĝin trovos abunde en Wien. Ĉu en la popola amuzejo en „Prater", ĉu pli bone, en gaja rondo, sekrete en vilaĝeto antaŭ la pordegoj de Wien. Tie troviĝas multaj malgrandaj gastejoj, kaj krono el pinverdaĵoj diras al mi, ke tie ĉi oni povas trinki, trinkadi — la famekonatan „Heurigen" (t. s nunjaran vinon). Gajaj melodioj, luditaj de la „Schramml-muzikistaro" kaj kantitaj de la trinkgaja popolamaso ĉie aŭdiĝas, kaj ĉiu, kiu serĉas veran popolan humoron, ĝin trovos tie ĉi ĉe botelo da nunjara vino. Estas certe, trinkante la junan vinon en Wien, oni kaptis guton da „Wien-a sango" kaj pli gaje kaj facilanime rigardos la vivon!

Sed ne nur la trinkemulo, ankaŭ manĝemuloj en Wien ricevos ĉiom laŭ gusto! Ho, tiuj ĉi delikataj, multspecaj farunaĵoj, kiel „Strudel", „Schmarren", „Fleckerl", „Nockerl" kaj multaj aliaj netradukeblaj specialaĵoj de Wien certe kiel por mi, ankaŭ por aliaj restos neforgeseblaj.

Ĉu mi tro multe laŭdis la urbon de nia Deksesa kaj ĝiajn aliĝilojn? Certe ne! Pri tio ĉiu konvinkiĝos estante tie! Sed ion mi ne forgesu, grava por ĉiu samideano. En Wien loĝas la plej ŝatinda geesperantistaro! En neniu regiono mi ĝis nun renkontis tiom da helpemaj gesamideanoj, kiuj preskaŭ sian tutan tempon dediĉis al la gasto, kiel en Wien. Ĉiam iu el la granda aro da bonege parolantaj esperantistoj estis je mia dispono kaj agrabligis al mi la ĉeeston en fremda — ho, baldaŭ tute ne plu fremda — urbo.

Do, gesamideanoj tutmondaj, kiel jam en Nürnberg, mi denove konsilas al vi: Venu en aŭgusto 1924 mil-milope al Wien, la ĉefkastelo de Esperanto!

Hildegard Nickel, Potsdam.

Vespero en universitata korto en Wien.

De *F. W. Illing.*

Sopiriga aromo el blankradiaj floroj de l' filadelfo ektremas en la varma vesper-aero, kiu preskaŭ senmove kuŝas super la silenta, ĝardensimila korto. La rebrilo de la suno radias ankoraŭ ruĝete en la altarkaj fenestroj de l'granda porfesta ĉambrego kaj, kvankam iom pli malbrile, sed ankoraŭ varme kaj orece, sur la ardezo de l' kupoltegmento alte superstaranta la mezan konstruaĵon. Jam ne bluege, sed nur arĝento-palebrilante, la ĉielo de la malfrua posttagmezo staras super ĝi.

La kortfundo (borderita per duoncirklaj ŝtupoj kun du artplenaj, forĝoferaj lanternofiguroj), el kiu — arko apud arko — kondukas tri altaj, ŝlositaj vitropordegoj en la „Aŭlon", estas senhoma. Forgesita korbseĝo el la sinjorina ĉambro devas ĉi tie pasigi la nokton. —

En la arkadoj, kiuj borderas la florantan korton, jam krepuskiĝas. La marmoraj bustoj kaj la kuprotabuloj ĉirkaŭe ŝajnas kaŝe rideti. Ili estas konsekritaj al viroj delonge mortintaj antaŭ jaroj, jardekoj, unu jarcento, — seriozaj, gravegaj viroj, kiuj en la „Alma mater Rudolfina Vienensis" instruis, ekzamenis, esploris, ĝis kiam la falĉisto „Morto" forprenis kun si la neniam laciĝintajn serĉantojn kaj gvidantojn.

De tempo al tempo laŭorgena tono el la pli profunde kuŝanta ejo de la akademia orkestro-unuiĝo kaj, el la ringstrato „12 de novembro“, aŭtomobil- aŭ tramsignalo enpenetras la senbruan mondon.

Sopire pepas birdeto.

Kiel silente do la korto revas! La sepa jam delonge pasis, ĉiuj aŭskultejoj estas jam mutaj kaj malplenaj. Nur en la biblioteko cerbumas la diligentuloj pri senkuraĝigaj porekzamenaj temoj aŭ enprofundiĝas kontente kaj pie en la interesajn fontojn por referatoj kaj disertacioj. —

Antaŭ la radiante blanka skulptaĵo de la tronanta Kastalio atendas studento kaj fordonas sin al la impreso de l' horo.

La sunlumoj estingiĝis, la sonoj de la „akademia orkestra unuiĝo“ mutiĝis. En momentoj, dum kiuj eĉ la mallaŭtiĝinta bruo de la ringstrato silentas, ŝajnas al mi, kvazaŭ mi estus en ĝardeno de malproksima fabelkastelo. Eble kelkiu kunstudento el la „Regno“*), veninta al la granda bela urbo apud la riverego de la Nibelungoj, ankaŭ povus senti sin traslokita en la idilian korton de iu nordgermana universitato. Ĉar escepte de mi kaj de la atendanto, ĉi tiu meze de belegaj, per gotikaj fenestroj ornamitaj kaj per balustradoj kronitaj konstruaĵoj kuŝanta ĝardeno estas tute forlasita de homoj.

Sed ne. Ĉe la fino de la transversa vojo, kiu kunligas la juristejon kun la filozofejo, reliefiĝas bela figuro el la mallumo de vitra pordo kaj paŝas tra la korto al la skulptaĵo de Kastalio. La juna viro iras renkonte al la blonda studentino en hela somervesto kaj kisas kun perfekta kavalireco al ŝi la manon. Li forprenas de ŝi la brunan, ledan skribaĵujon. Tiam ili paŝas malrapide kaj enreviĝe trans la korton, tra la arkado kaj tra la vitropordo en la „Aŭlon“.



Preĝejo de Sankta Karlo.

De sur la urbdoma turo eksonegas ok metalaj sonoj. Nun la granda konstruaĵaro estas ŝlosonta siajn multajn pordojn. Maljuna, glaciogriza pedelo glitiras ŝlosilintingante tra la arkadoj. Mi do obeas lian admonon.

Morgaŭ je la oka mi estos ree ĉi tie!

Jen mia mondo, mia hejmo!

El germana lingvo trad.
F. Zwach.

*) Regno signifas en Aŭstrio ĉiam: Germana Regno.

Al la tutmonda gejunularo!

Dum la Deksesa en Wien okazos ankaŭ aranĝo de internacia kunsido de tutmonda junularo. Oni parolos pri sporto, turismo, skoltismo kaj ilia akcelado per Esperanto inter la junuloj. Ankaŭ pri forta internacia organizo junulara estos diskutata. Konstituiĝis jam prepara komitato, kiu donos informojn pri loĝo, manĝo, gvidado tra la urbo, pri ekskursoj farotaj ktp.

Partoprenontoj de la Deksesa turnu sin al la prepara komitato junulara, p. a. Max Ultmann, Wien IX., Wagnergasse 9/18.

Al ĉiu demando aldonu sendkostojn!

Naŭ naciaj kongresoj esperantistaj je pentekosto.

IX. Itala Kongreso en Torino kaj Verona. - II. Sudslava Kongreso en Split.

Leginda artikolo de s-o Prof. Grosjean-Maupin pri „Principa kontraŭeco“.

Neveraj informoj.

Naŭ naciaj kongresoj je pentekosto!

Kiam ni forsendas tiun ĉi specialan numeron de ET, laboremaj samideanoj en naŭ diversaj landoj preparas sin. Ili rapidas por ĉeesti landan demonstracion pri Esperanto. Ni sekvas ilin spirite. Ni vidas ilian laboron. Ni konstatas ilian sukceson. Ni aŭdas iliajn dezirojn por nia komuna afero. Ni simpatias kun ili. Ni ne jam povas sekvi ilin efektive. Sed tre baldaŭ ni faros tion. Jen samideanoj preparas nian ĉiujaran demonstracion por la tuta mondo. Nia hodiaŭa numero informas pri ilia klopodado.

Kio rezultas el tio?

Nia movado vivas. Ĝi estas granda, potenca. Sed ĝi estas ankaŭ praktika. Naŭ naciaj kongresoj pruvas tion, ankaŭ la mondkongresoj. La fakkunsidoj vidigas, ke nia sfero estas ankoraŭ multe pli granda.

Kaj entuziasmo ekkaptas nian koron, vigligas nian spiriton, instigas nin je plua celkonscia laboro por la granda ideo, al kiu ni servas. Al niaj laborantaj samideanoj preparantaj la vojon ni samtempe deziras plej bonan ŝancon al ilia laboro. Por ke ni venku! *Robert Kreuz.*

II-a Sudslava Esperanto-Kongreso

en Split (Dalmacio) 23-25 aŭgusto 1924.

Aprila komuniko.

Konsiderante diversajn petojn de en- kaj eksterlandaj samideanoj la kongresa komitato ĵus decidis, ke la II-a en Split okazu de la 23 ĝis la 25 de aŭgusto.

Aliĝoj okazas ĉe la sekretario s-o Ante Margetić, poŝtdirekcio, Split.

Kotizo ĝis la fino de junio 25 dinaroj; poste 35 din. Alilandanoj pagus la saman sumon. Monsendoj al la kasisto: S-o Vladimir Krolo, polica komisario, Split.

Proponoj kaj referatoj estu sendataj al la prezidanto s-o R. Rupčić, Palmina 9, Split.

Vojaĝkostoj. Informoj riceveblaj de Turista Oficejo, Split.

Ekskursoj. Okazas kelkaj ekskursoj: al mondfama blua groto de Biševo, al antikva urbo Trogir, al la ruinoj de Salona kaj al la perlo de Dalmacio: Dubrovnik (Ragusa).

Kongresa Komitato.

IX. Itala Kongreso de Esperanto.

Laŭ interkonsento de Organiza Komitato en Torino kaj C. K. de FEI. atingita en Genève kaj jam anoncita en Itala Esperanta Revuo la Naŭa Itala Esperanta Kongreso estos dividata en du partojn: neoficiala en Torino (kun Antaŭkongreso Internacia) kaj oficiala en Verona.

La kongreso malfermiĝos do en Torino la 3 aŭgusto, kai tie okazos paroladoj en Esp. pri diversaj temoj, akceptoj kaj amuzaĵoj. La 4. 8. vespere forveturos la Karavano al Verona, kie jam la saman vesperon okazos akcepto kaj vizito de la urbo per la unuaj alvenontoj. La 5. 8. okazos en historia Salono „Gran-Guardia“ oficialaj kunsidoj de FEI, kaj de fakuloj; vespere en famekonata Romana Areno la kongresanoj ĉeestos unu el la mirindaj prezentadoj de opero. La teatraĵaro tiun ĉi jaron enhavas Parsifal kaj Andreo Chenier, unu el kiuj estos do ludata antaŭ la esp. kongresanoj kune kun la multmilaj diversnaciaj kutimaj ĉeestantoj de tiaj prezentadoj.

La postan tagon la kongresanoj al Wien forveturos karavane, dum la restantoj partoprenos ekskurson al Lago de Garda.

Pliajn sciigojn ni sendos poste, aŭ oni petu ilin de Itala Esp. Federacio (FEI.) en Verona, Casella Postale 25. En Torino kiel en Verona eksterlandanoj estos kore kaj plenorde akceptataj.

Direktantoj, oficistoj aŭ interesatoj ĉe Ŝparkasoj, Popolaj Bankoj kaj ĝenerale Bankoj kaj ekonomiaj financaj organismoj havigu sian adreson al Itala Esperantista Federacio, Verona, Casella Postale 25, por esti sciigataj pri gravega afero.

La fondo Esperanto-Hejmo Göppersdorf.

La emo de la noblanima kreinto de la mondhelplingvo Esperanto estis, igi Esperanton helpema al ĝeneralaj, nobligaj kulturceloj kai bonfaroj. Senlaca disĉiplo de tiu ideo estas la ideale pensanta altruista laboristo Paul Rauschenbach en Göppersdorf apud Chemnitz.

Per senĉesa diligenteco kaj persistema energio li antaŭenpuŝas la ideon, krei en sia vilaĝo Esperanto-hejmon, kie krom kulturaspiroj havu lokon ankaŭ la bonfarado. Ĉajn monrimedojn el en- kaj eksterlando oni donis al lia dispono, tamen ili ankoraŭ ne sufiĉas, pretkonstrui la farotajon. Bedaŭrinde estus en la intereso de Esperanto, se la bona ideo ne povus esti realigata. Kia nun estas la plano?

La ampleksa, hela domo kun granda, bela ĝardeno, ricevonta kunsidsalonon, instru- kaj manĝejojn kaj kelkajn gastĉambrojn por Esperanto-pensionuloj estas atentinda plano.

Krome ĝi enhavas kelkajn mastrum- kaj laborejojn. Unu teretaĝa ĉambro taŭgos por gastado per simpla manĝaĵo kaj senalkoholaj trinkaĵoj. Tiu laŭ plandesegnaĵo belege efektanta konstruaĵo kun granda esperanta stelo kaj la nomo „Esperanto-Hejmo“ sur la fasado estos starigata sur altaĵo, videbla al vojaĝantoj sur la fervoja linio Chemnitz-Leipzig, kaj estanta bonega propaganda rimedo.

Pri la destino de la fondaĵo informas la fondanto laŭ prospekto ienon:

Ĝi intencas krei:

1. **Por niaj infanoj:**
Ludejon kaj ĝardenon, kies produktoj, de la infanoj mem kulturitaj, ankaŭ de ili mem estas konsumataj, instruĉambron por Esperanto-instruado; restadejon por infanoj farantaj la taskojn de lernejo; ejon por manlaboroj.
2. **Por nia junularo:**
Spacon por nobla societemo kaj klarigantaj kaj klerigantaj paroladoj kaj kursoj; leg- kaj skribĉambroj.
3. **Por plenkreskuloj:**
popularajn paroladojn; koncertojn kaj elementarsciencajn kursojn.
4. **Por gemaljunuloj kaj gebezonuloj:**
Restadejojn dum la malvarma sezono; laŭ ebleco manĝigadojn kaj provizon per vestaĵoj.
5. **Por industrio kaj komerco:**
Tradukojn de kaj en Esperanto; informojn kaj sciigojn pri eksterlandaj aferstatoj; peradon de komisioj.
6. **Por ĉiuj loĝantoj:**
Konstruaĵon por refreŝigo kaj kulturakcelado, kiu al nia regiono estos ornamaĵo kaj gloro. La kunlaboro de ĉiu estas dezirinda kaj necesa. S-ino Zamenhof, la vidvino de la kreinto de Esperanto, estas protektantino de la nova fondo, s-o Prof. D-o Dietterle en Leipzig kaj s-o Prof. D-o Wicke en Chemnitz honormembroj. Kiu povas kaj emas helpi, sendu la donaĵojn aŭ al Paul Rauschenbach en Göppersdorf b Chemnitz aŭ al Girokasse Göppersdorf b. Chemnitz por konto 619 Bayer und Heinze en Burgstädt für „Stiftung Eperanto-Heim“.

E. Klemm, Chemnitz.

Radio.

Sovetlanda Radio-Societo.

En Leningrad estas fondita Radio-Societo, kies agadsfero ampleksos la tutan Unuiĝon de Sovetaj Socialistaj Respublikoj. Lokaj esperantistoj jam entreprenis klopodojn por enkonduki en ĝin Esperanton. Tutmondaj samideanoj kaj precipe radio-organizaĵoj simpatiantaj kun Esperanto kiel radio-lingvo estas petataj sin turni al la societo kun propono uzi Esperanton. Adreso de la societo: Radio-Societo, Pgr. St., Lopuhinskaja ul. 14 a, Leningrad. *Gete.*

Principa kontraŭeco.

Ĉiu reklamisto scias, kiel grava estas la trafa elekto de la nomo por la reklamota afero; multaj komercistoj kaj industriistoj dankis sian sukceson nur al ia lerte elpensita titolo aŭ reklama frazeto.

La kreintoj de Ido, elektante tiun nomon por la nova lingvo, montris, ke ili estas almenaŭ tre lertaj reklamistoj, ĉar la plej efika batalilo de Ido kontraŭ Esperanto estas ĝuste tiu ĉi nomo „IDO", kiu erarigas ne nur la neesperantistan publikon, sed eĉ ankaŭ kelkajn esperantistojn, kredigante, ke la lingvo Ido estas ja ido kaj filo de Esperanto, bazita sur tiaj samaj principoj, kiel la patro, kaj diferenciĝanta nur per flankaj, malĉefaj, facile ŝanĝeblaj detaletoj. Memkompreneble estas, ke Ido, estante nur posta formo de Esperanto, estas pli perfekta ol ĝi, ĉar la filo, naskiĝinte pli malfrue, povis profiti la antaŭan sperton de la patro kaj evoluinte pliboniĝis.

Tio estas malverajo. Ido ne estas nek povas esti filo de Esperanto; ĝi eĉ ne estas nek povas esti bastardo de Esperanto, pro tio, ke, estante bazita sur principoj ne nur tute diferencaj je tiuj de Esperanto, sed eĉ tute kontraŭaj al ili, ĝi ne apartenas al la sama lingva familio. Tiun malsamfamiliecon kaj absolutan kontraŭecon estas facile konstati, konsiderante la principojn de Esperanto kaj komparante ilin al la principoj de Ido:

1. Primetoda principo: praktikeco.

Zamenhof ĉiam juĝas la lingvajn demandojn el vidpunkto praktika, ne teoria; li ĉiuokaze rezonas kiel multsperta lingvouzanto. „Neniam gvidu vin, li diras, per konsideradoj teoriaj, kiel ajn belaj ili ŝajnas . . . Senfrukta kaj danĝera estas la sekvado de teoriaj principoj, se ni ne demandas nin, kian praktikan signifon ili havas. Tio, kio en la teorio ŝajnas tre bona kaj trovas aprobantojn, en la praktiko ofte havas nenian signifon." La sperto sciigis al li, ke ĉiu „idealo de perfekteco estas nur individua, pli malpli arbitra, kaj aliiĝas kun la personoj tiamaniere, ke nenia akordiĝo estas iam efektivigebla inter la diversaj teoriistoj; nur la neeviteblaj bezonoj de la praktika uzebleco kapablas trudi vole-nevole al ĉiuj komunajn kondiĉojn kaj nediskuteblajn regulojn.

Male, Ido ĉiam juĝas la lingvajn demandojn el vidpunkto abstrakta kaj teoria; ĝi konstante rezonas kiel matematikisto aplikanta al la lingvaj, nature malsimplaj, multflankaj kaj interplektitaj, aferoj la rigidan, sencedan kaj senkompromisan, tie ĉi netaŭgan, matematikan metodon. Ĝi celas lingvon konforman al nure teoriaj principoj, lingvon idealan kaj teorie perfektan.

2. Ĉefa principo: Facileco.

Zamenhof persiste opinias, ke la unua kaj plej grava kondiĉo por lingvo internacia estas la plej eble granda facileco. Estas nepre necese, li ripetas multfoje, „ke la lingvo estu eksterordinare facila." Li rigardas la internacieon de la vortaro nur kiel unu el la diversaj uzeblaj rimedoj por atingi la plej grandan facilecon.

Male, Ido rigardas la internacieon de la vortaro kiel la plej superan kaj esencan regulon de la internacia lingvo kaj kiel absolutan senkondiĉan principon. „Parolante nur pri la necesega facileco de la internacia lingvo, oni malprave silentas pri la esenca principo: la internacieco de la formantaj elementoj . . . Ĉiuj radikoj devas esti kiel eble plej internaciaj . . . La lingvo internacia devas submeti sin plej severe al la regulo de internacieco, eĉ de la maksimumo de internacieco . . . La maksimumo de internacieco estas la idealo de la lingvo."

3. Dua principo: Facileco por ĉiuj.

Difinante la facilecon, pri kiu li parolas, Zamenhof precizigas sian penson: la lingvo devas esti kiel eble plej facila „por ĉiuj", eĉ „por nekleruloj". Li klare konscias pri la malsameco inter la facileco, kiun li celas, kaj la facileco, kiun celas Ido: „Tute ne estas bezone, li diras, ke, kiel opinias multaj pli novaj projektistoj, la instruitaj lingvistoj povu tuj kompreni tekston skribitan en lingvo internacia. En tia afero la instruitaj lingvistoj ludas la lastan rolon, ĉar por ili ja tia lingvo estas malplej bezona."

Male, Ido, en siaj propagandiloj, precipe fieras pro tio, ke, „estante tre analoga al Esperanto, ĝi tamen superas Esperanton pro sia tuja komprenebleco." Sed la idistoj forgesas aldoni, ke tiu ĉi mirinda tuja komprenebleco, aŭ, pli ĝuste, divenebleco, koncernas nur la „poliglotulojn".

4. Tria principio: Derivado ne ekzistas en Esperanto.

Ĉar „en nia lingvo ĉiu parto gramatika prezentas apartan vorton", la malsimplaj vortoj estas nepre formataj nur per kunmetado, neniam per derivado. Sekve neniu ajn regulo pri derivado, kiel ekzemple la regulo pri renversebleco, povas koncerni Esperanton. S-o Couturat plene eraras kaj erarigas la legantojn, kiam li asertas, ke „la sistemo de la derivado en Esperanto estas sendispute la plej karakteriza trajto de tiu lingvo." Kontraŭe, la plej karakteriza trajto de nia lingvo estas ĝuste la neekzistado de iu ajn derivado. Neniam pri la derivado parolis Zamenhof, kaj, en la jaro 1913, la Akademio oficiale deklaris, „ke la vortfarado de Esperanto estas fondita sur la konstruo de ĉiu aparta vorto kaj ne sur tiel nomitaj reguloj de derivado."

Male, en Ido, la derivado estas la plej grava kaj plej ofta procedo de vortfarado, kaj s-o Couturat verkis specialan „traktaton pri derivado en Esperanto", konscie aŭ nekonscie konfuzante siajn proprajn teoriojn kun la ideoj de Zamenhof kaj malprave altrudante al Esperanto procedon, kiun efektive ĝi ne konas, kaj regulojn pri derivado, kiuj tute ne povas konveni al lingvo ne uzanta la derivadon.

5. Kvara principo: Senabsoluteco kaj senrigideco de la principoj kaj reguloj.

Zamenhof, ĉiam celante kontentigi ne la postulojn de abstraktaj teorioj, sed la malsimplajn diversflankajn bezonojn de la praktiko, konstante ripetis la konsilon: „Ĉio devas esti en ĝusta mezuro", kaj li aplikas tiun ĉi rezervon al ĉiuj principoj kaj gvidreguloj. Oni devas „kunigi kaj konsentigi inter si diversajn principojn . . . Esperanto kontentigas ĉiun principon laŭ mezuro de ebleco, penante plej zorge, ke ĝi ne kontraŭagadu al aliaj pli gravaj principoj." Li opinias, ke lingvo internacia devas kontentigi ne nur la postulon pri logikeco aŭ ian ajn alian postulon, sed ankaŭ „ĉiujn aliajn postulojn, kiuj povas esti farataj al lingvo internacia" kaj kiujn tute ne zorgas la idistoj, ekzemple la „naturecon, vivipovecon, flekseblecon, sonorecon ktp."

Male, Ido rigardas siajn principojn kiel nepre absolutajn kaj senkondiĉajn kaj, laŭ la rimarko de Zamenhof mem, ĝi „penas pliboniĝi unu ian flankon de la lingvo, oferante por tio ĉi ĉiujn aliajn flankojn".

Tiun ĉi superan ĝeneralan regulon de „ĝusta mezuro" Zamenhof precize aplikas mem al kelkaj apartaj demandoj, logikeco, komuna uzado, unusignifeco, idiotismoj ktp.

Li malkonsilas la tro grandan logikecon", li ne akceptas la logikaĵojn, „kontraŭ kiuj protestas lia lingva sento"; li rekomendas, ke „nia lingvo ne estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem katenus . . . Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi pli gravan rolon ol seka teoria logikeco . . . Ne sole en naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto de bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika; ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon absolutan, tiam la libera uzado de lingvo fariĝos tute ne ebla."

Sammaniere, kvankam Zamenhof rigardas la unusignifecon de la vortoj kiel ĝenerale taŭgan kaj preferindan, kvankam li plej ofte unusignifigis la radikojn, tamen tiun ĉi regulon li aplikas ankaŭ „en la ĝusta mezuro" kaj sen ia absoluteco. Tial troviĝas en la Fundamenta Universala Vortaro kelkaj radikoj, kiuj estas nur ŝajne unusignifaj, ĉar ili estas tradukitaj per nacia vorto, kiu estas plursignifa. La Vortaro de Bein eĉ apartigas per ciferoj la diversajn de la plursencaj radikoj.

La samo fariĝas pri la idiotismoj: kvankam Zamenhof konsilas traduki la naciajn apartaĵojn per esprimoj klaraj por ĉiuj kaj internacie kompreneblaj, tamen li ne ekstermas senkondiĉe la idiotismojn, t. s. la ne plene logikajn esprimojn. Li tute precize deklaras, ke „ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj idiotismoj, kaj tute malprave kelkaj esperantistoj ilin kontraŭbatalas, ĉar lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo sen vivo kaj tro peza."

Male, Ido tute ne zorgas pri interkonsento nek pri komuna uzado; ĝi konstante atentas nur la teorian rigidan logikecon, kiun ĝi ofte malprave konfuzas kun la klareco kaj facila internacia komprenebleco; postulante severan unusignifecon, ĝi malpermesas la plursignifecon de la radikoj kaj vortoj: „Tio, kio distingas Idon, estas la absoluta internacieco . . . Ido ne estas bazita sur la komuna uzado, kiel la naturaj lingvoj, sed nur sur la logiko, kaj la tutan logikecon de la lingvo konsistigas la principo de unusignifeco." Ido pretendas absolute forigi la idiotismojn kaj, deklarante, ke „la idiotismo estas la plej danĝera malamiko de la lingvo internacia", ĝi fieras, ke la „propra karakterizilo de tiu ĉi lingvo estas, ke ĝi havas nenian idiotismon, nek en la gramatiko, nek en la formado de la vortoj, nek en la frazeologio."

Ni sekve rajtas diri, ke Ido tute malprave kaj malvere distrumpetas, ke ĝi „ne estas nova lingvo", ke ĝi estas „nur plisimpligita kaj pliboniĝita formo de Esperanto, kiu konservis la esencajn principojn, al kiuj Esperanto dankas sian sukceson". Tio estas mensogo. En la realeco Ido estas lingvo kerne kaj esence diferenca de Esperanto, malgraŭ ŝajna supraĵa kaj ekstera simileco; ĝi ne havas pli da rajto por pretendi sin pliboniĝita formo de Esperanto ol ekzemple la latina senfleksia lingvo de s-o Peano aŭ la lingvo Apolema, aŭ Dilpok, aŭ Novilatin, aŭ ia ajn el la ceteraj proponitaj internaciaj lingvoj, kiuj neniam reklamis sin idoj kaj formoj de Esperanto. Ido similas la kukolon, kiu, ne estante kapabla konstrui mem neston, metas siajn ovojn en la neston de alispeca birdo. Nepra devo estas por la esperantistoj forĵeti la fremdajn kukolajn ovojn kaj denunci senhezite la artifikan kaj hipokritan taktikon de la idistoj, konsciante, ke tiu, kiu akceptas kaj trovas taŭgaj la pricipojn de Esperanto, ne povas akcepti samtempe la pretendatajn pliboniĝojn de Ido, bazitajn sur principoj tute kontraŭaj.

Kuraĝu do fine la sinjoroj idistoj malkaŝe batali sub sia propra standardo, ne pruntoprenante ŝtele la Esperantan standardon.

Prof. E. Grosjean-Maupin.

Neveraj informoj.

En ET 185 ni publikigis tradukon de la dekreto de l' prusa ministro por scienco, arto kaj popolklerigo de l' 10 marto.

Kiamaniere la informo estas malbonuzata, montras la jena fakto:

En „General-Anzeiger" de Frankfurt a. M. de l' 8. 5. ni trovis la sekvantan noton:

„Akcelado de la instruado de Esperanto kaj Ido." La Prusa Ministerio por Scienco, Arto kaj Popolklerigado direktis dekreton al la provincaj instru direkcioj, ke la instruado de la mondhelplingvo Esperanto estu ĉie akcelata per la lernejoj. Tie, kie taŭgaj instruantoj estas disponeblaj, la instruado povas ankaŭ esti farata pri la mondlingvo Ido."

Similajn notojn ni trovis en pluraj aliaj gazetoj.

Ĉiu leginto de tiu ĉi noto devas nepre kredi, ke la lasta frazo de la gazetinformo estas ekstraktita el la dekreto.

Kiel niaj legantoj scias, la dekreto enhavas eĉ ne unu vorton pri Ido. Estus ja sensence, se instrua administracio intencus samtempe enkonduki du helplingvojn. Ni demandas: Kiu rajtigis la sendinton de la noto tiel informi la publikon? De post kelka tempo oni povas konstati revigliĝon de la areto da idistoj, kiuj vivas de la sukcesoj de Esperanto. La esperantistoj faris kaj faros bone ĝenerale ignori ilin. Sed la praktiko montras, ke ili havis bonan maistron. La antaŭmilita metodo neniel ŝanĝiĝis. En kelkaj gazetoj la idistoj aludis al interparolo kun reprezentanto de la koncerna ministerio, kiu laŭ nia konstato nur havis privatan karakteron. Se en tiu ĉi interparolo estas dirita tio, kion disvastigas la idistoj - kaj kion ni ege pridubas - ni devas miri pri la metodo de privatuloj tiel korekti kaj kompletigi la dekretojn de ministerio, kiel ŝajnas laŭcele por ilia afero.

Sufiĉas konstati tie ĉi, ke la publikigita dekreto eĉ ne per unu vorto aludas al Ido.

* * *

Simila afero okazis en radio-sfero. Antaŭ kelka tempo jam oni disvastigis en eŭropaj gazetoj, ke la granda amerika radio-kompanio American Relay League estus enkondukinta Idon en plurajn radio-lernejojn kaj lecionoj donataj de kelkaj stacioj. Ni sciigis, ke tio estas tute malvera. Intertempe ni konstatis sole, ke simpla idisto-inĝeniero en Boston (Mass.) kun permeso de la tiea stacio donis kelkajn lecionojn en Ido. Intertempe la lecionoj estas finitaj pro nesufiĉa partopreno. Aliflanke la kompanio kredeble ne plu longe hezitos por akcepti Esperanton, post kiam centoj da leteroj al ĝi pruvis la disvastiĝon de Esperanto.

En Eŭropo la areto da idistoj propagandas Idon por la radio-sfero, aludante al la malverajo, ke Ido estas enkondukita en usonajn radio-lernejojn. La decidoj de la radio-konferenco en Genève ja baldaŭ silentigos ilin. Sufiĉas konstati la malgravecon de la afero, se du aŭ eĉ kvin usonaj stacioj uzas Idon, dume ekzistas en tuta Usono pli ol 50 000 sendaparatoj. Ŝajnas evidente pli grave, ke el 50 radio-stacioj kaj kompanioj en Eŭropo 39 ĉeestis la konferencon de Genève kaj voĉdonis por Esperanto.

Oni foje asertis, ke Ido estas pli bona ol Esperanto. Laŭ proverbo la bono mem liberigas al si la vojon. Kial do ĝiaj anoj bezonas tiajn metodojn? Obiektiva observanto kredeble dubos pri tiu laŭdita boneco. Ni mem ja jam de longe dubas same. Kaj la idistoj restas blindaj. Verŝajne por ĉiam.

Internacia Asocio de Biblio-Studantoj.

La prezidanto de tiu ĉi Asocio, s-o J. E. Rutherford, eksjuĝisto je la Alta Juĝejo en New York, komisiis, ke dum la XVI-a Kongreso de Esperanto okazu publikaj paroladoj same kiel dum la pasinta XIV-a en Helsinki kaj XV-a en Nürnberg. Ni pro tio petas ĉiujn interesatojn, kiuj deziros ĉeesti niajn fakkunsidojn en Wien, ke ili bonvolu noti tion sur la aliĝiloj al la Kongreso sub la rubriko „Fakkunsidoj", notante simple la titolon de nia Asocio.

Por tiaj interesiĝontaj gesamideanoj, kiuj ĝis nun ne konas la celon de la Asocio, ni informas jene: —

Internacia Asocio de Biblio-Studantoj ne registras membrojn en listoj, ĝia nomo nur prezentas la fakton, ke biblio-studantoj de la tuta mondo, unuigitaj per la ligilo de la vero kaj amo, fraesploradas la Biblion.

Nenia formalaĵo, nek aliĝo, nek kotizo estas necesaj, por aparteni al I. A. B. S. Ĉiuj, kiuj estas konsentaj al tiuj, kiuj studadas la Biblion en la lumo de la nun allima vero, estas biblio-studantoj. Estas la libereco de ĉiuj, ekinterrilatiĝi kun ni. Ni povos indiki adreson de biblio-studanto je la urbo de ĉiu skribonto pro ebla deziro de interŝanĝado de pensoj.

La sola celo de I. A. B. S. estas: Studadi kaj proklamadi la vorton de Dio, por helpi al ĉiuj volemaj je fido. Tial I. A. B. S. praklamas la veron ĉial, eĉ se tio alportus kalumniadon kaj persekutadon.

Je ĉiaj pluaj informoj ni estas pretaj. Pluaj sciigoj pri la fakaj konferencoj dum la XVI-a sekvos. —

Garda Turo, Biblio- kaj Traktat-Societo
Esperanta Fako
Landstr. 277, Rieden bei Baden, Svisl.

Internacia Esperantista Ekspozicio en Strasbourg

dum somero 1924.

Dum somero 1924 malfermiĝos en Strasbourg internacia esperantista ekspozicio.

La loka esperantista grupo petas do la tutmondan samideanaron bonvole sendi kiel eble plej multe da dokumentoj koncerne la ĝeneralan movadon esperantistan kaj la plej diversajn fakojn: arto, literaturo, scienco, politiko, religio, polico, komerco ktp. Ĉiuj eldonaĵoj en Esperanto aŭ parte en Esperanto redaktitaj estos dankeme akceptataj.

Ĉiu nacia asocio sendu detalan raporton en Esperanto pri la disvolviĝo de nia movado en sia lando. Tiuj raportoj estos afiŝataj en la budoj kaj de ni tradukataj en du lingvojn naciajn (franca kaj germana), tial ke la publiko vizitonta la ekspozicion konsciu facile kaj rapide pri nia tutmonda movado.

La urbo Strasbourg pro ĝia geografia situacio taŭgas perfekte por tia internacia manifestado, kies sukceso povas grave influi la ĝis nun neŭtralan publikon

Propagandfolioj estos ankaŭ akceptatai.

Ĉiuj dokumentoj estu sendataj al nia fervora samideano s-o Antono Schwartz, 15 Rue du Maréchal Foch, Strasbourg (Francujo).

Ne prokrastu vian sendon kaj konstante amasigu novajn dokumentojn.

La ekspoziciotaĵoj estos resendataj al la sendintoj laŭ ties deziresprimo.

Helpu al ni, karaj samideanoj, por montri denove al la publiko la solidarecon kaj servojn de la esperantistoj! *Hub. Férez.*

II-a kongreso de lernantoj de komerc- kaj industriaj institutoj en Portugalujo.

Alvoko al la samideanaro.

En la portugala mezlanda urbo Coimbra okazos, la 14, 15 kaj 16 junio la II-a Kongreso de Lernantoj de Komercaj kaj Industriaj Institutoj. La I-a Kongresa estas salutinta Esperanton, sed ne aprobinta decidon pri tiu lingvo pro manko de elementoj aŭ tezo. Ĉi tiun jaron oni prezentos al Kongreso detalan raporton pri Esperanto kaj deziresprimon, kiu estos aprobata, ĉar la organiz-komitato tiucele faris persistan propagandon. Sed por ke la konvinko estu definitiva, por ke dubo ne restu pri la taŭgeco de Esperanto, ni petegas la tutmondan samideanaron, ke ĝi skribu p-kon ne ilustritan enhavantan almenaŭ ĉi tiujn du vortojn: Saluton al Kongreso, el . . . . aŭ kelkajn deziron, kaj ĝin sendu al: Meza do Congresso das Escolas Comerciaes e Industriaes, Coimbra (Portugal). Ni ankaŭ skribis al fakaj asocioj petante, ke ili sendu leteron al Kongreso pledante por Esperanto.

Ĉi tiu simpla ago estos plene fruktodona, ĉar Esperanto estas ankoraŭ en tiu ĉi lando rigardata de la plimulto kiel neserioza entrepreno, malgraŭ nia senlaca propagando, kiu nur inter laboristaro absolute sukcesas. Do ni esperas, ke la tuta mondo esperantista plenumos nian peton, kaj Esperanto ektriumfos ĉe la dubantoj.

Por Nova Vojo (Prakt. Kurso):
José Antunes, Lisboa.

Imitinda ekzemplo.

La forte pulsanta esperanta movado en Dalmacio, kies iniciatinto estas la jam en 1922 fondita „Esperanto Klubo" en Split, mirigas la enkaj eksterlandajn samideanojn. La modestaj apostoloj de tiu ĉi grandsignifa ideo, elpensita de la granda geniulo D-o Zamenhof, estas nun troveblaj en urboj kaj vilaĝetoj de la sunplena orienta marbordo de Adriatiko. Nepriskribeblaj estas la fervoro, la entuziasmo kaj la spirito de niaj bravaj adeptoj, kiuj per ĉiui siaj fortoj klopodas por kiel eble plej ampleksa kaj firma disvastigo de Esperanto. Sed kiel ĉie en la mondo ankaŭ la kolegaro en Dalmacio batalas kun gravaj financaj malhelpoj, kreskantaj sampaŝe kun la plua evoluo de la movado. Nia malproksima samlandano s-o J. M. Vujičić, nun pene laboranta en Aŭckland (Nova Zelando), eksciinte pri la sukcesoj de Esperanto en Dalmacio kaj pri la malbonaj monaj cirkonstancoj de la senlace propagandantaj splitaj samideanoj, kun kortuŝa gesto kolektis inter siaj samnacianoj en Nova Zelando belan monsumon, kiun li donace sendis al nia Esperanto Klubo. Plenumante la tre agrablan devon de danko, ni volas citi la nomojn de la malavaraj donacintoj por ke ilia bela ekzemplo instigu ĉiujn niajn samlandanojn dissemitajn en ĉiuj terpartoj fari ion similan por nia vigla Esperanta Klubo. Jen la nomoj: Rastović, Franić, Peričić, Devčić S, Pivac, Radoraučić, Lukan, J. Katić, Zvičević, Vidović, Godinović, Jugović, Devčić Z., Cvitanović, Šimmović, Antunović, Bozić, Juretić, Djiković, Delić, Dean, Majstrović kaj Vujičić. Honoron al vi, bravaj laboristoj, kiuj en profundaj minejoj kaj malproksimaj kampoj pensas je ni! *R. R.*

Dalmacio, la lando de la suno kaj de la maro.

La alvoko publikigita sub tiu ĉi titolo en ET n-o 159 havis ĝis nun tre bonan sukceson. Multnombraj samideanoj el 12 landoj petis informojn, sendis konsilojn kaj gvidlibrojn. Estas neeble priskribi la kontentecon de la societo: „Narodna Prosvjeta" je tiu bela sukceso. Pro teknikaj malfacilaĵoj la presigo de la anoncita albumo devis esti prokrastata, kiel ankaŭ de la rilataj ilustritaj prospektoj. Post fino de grava kaj urĝa laboro ni respondos al ĉiuj pli interesaj demandoj. Al ĉiuj senescepte samideanan dankon kaj certigon, ke ni laŭforte plenumos iliajn dezirojn. Sed ĉi tie ni devas atentigi la karajn respondintojn kaj informpetintojn, ke senpaga havigo de la anoncita albumo tute ne estas ebla pro la grandegaj preselspezoj.

Esperanto Klub Split.

Tre estimataj kolegoj samideanoj!

Neniu el preskaŭ ĉiuj pozicioj de la socia vivo estas tiel internacia, kiel la pozicio de l' scienculo aŭ de l' tiel nomataj liberaj profesioj. Servi vere al la scienco, tio estas apliki ĝin al la vivo kaj sendiferencigi ĝiajn utilojn al la tuta homaro.

Kiamaniere tion plenumi, realigi?

Ekzistas nur unu respondo: retrovi en la homa psiĥa evoluo tiajn leĝojn, laŭ kiuj ĉiu homo disvolvadas sendiferente, ĉu li estas germano aŭ franco, polo aŭ ruso ktp. Aspekti la naciajn ecojn nuraj loke necesaj kvalitoj, evoluiĝintaj el la lokaj kondiĉoj, sed havantaj al la vera homaraneco nur duan signifon; ili estas nur tonoj en granda tuthomara simfonio.

Ni studentoj, se ni intencas vere servi al la scienco, devas tion memori kaj resti fremdaj al ĉiuj ideologioj, kiuj propagandas la ŝovinismon nacian. Bedaŭrinde la studentaro ĝenerale ne komprenis ankoraŭ tian gravan neceson de vera scienculo kaj sekvas la plej reakciajn, emocie nur kompreneblajn ideologiojn.

Kolegoj-samideanoj! Antaŭ ni kuŝas la devo, kiel esperantistoj ĉiam kaj ĉie disvastigadi la tuthomaranecon, kiun ni nomas Esperantismo.

Sed estas ankaŭ praktikaj kaŭzoj, kiuj igas nin esti internaciistoj, tio estas nia fako. Ni studentoj havas ofte la feliĉon viziti alinaciajn altlernejojn kaj tiamaniere ni renkontas tie ĉieajn kolegojn, kiuj havas la samajn celojn, kiel ni. Se ni ne povos kaj ne akcelos la interkompreniĝon, tiam ni ne povos forigi tiujn malfacilaĵojn, kiujn multaj el niaj kolegoj havas en fremdaj altlernejoj.

Tre ni estas unuavice studentoj kaj ni sekvu niajn sciencajn kaj fakajn interesojn.

Elirante el tiu vidpunkto la Studenta Internacia Faka Kunsido ĉe la XV-a Kongreso de Esperanto en Nürnberg komisiis min fondi Centran Komitaton por la Organizado de la Tutmonda Studentaro Esperantista. Ĝi elektis ankaŭ naciajn delegitojn, kiuj prenis sur sin la taskon sciigi al la C. K. pri la studenta vivo en ĝeneraleco kaj esperantista speciale de sia lando.

Bedaŭrinde ĝis nun la C. K. ne ricevis sciigon.

Tial la C. K. sciigas la jenon: Pro tuta manko de monrimedoj ĝi estis devigita limigi sian laboron nur por la interna loka laboro. Zorgis pri la Studenta Renkontejo en Berlin, kie ĉiu kolego povas trovi konsilon kaj spiritan helpon. Ĉiu kolego povas sin turni por atingi informaciojn pri la studenta vivo en Germanujo kaj precipe en Berlin laŭ la adreso: „Studenta Esperantista Renkontejo", Berlin N. 4, Eichendorfstrasse 4.

Kaŭze de la alproksimiĝanta XVI-a la C. K. havas la honoron dissendi al la ŝtata studentaro jenan demandaron; de ĉies unuopa studento estos nepra devo tuj respondi.

Demandoj.

1. Ĉu en via urbo ekzistas iu altlernejo kaj kiu (Nomo kaj adreso)?
2. Kia estas la studenta vivo ĝenerale kaj esperantista speciale ĉe tiu altlernejo?
3. Ĉu ĉe tiu altlernejo ekzistas aŭ ekzistis esperantista grupo (Nomo de la gvidanto kaj lia adreso — kiom da membroj ĝi havas)?
4. Se ne, ĉŭ iu klopodis fondi similan grupon (kiu - lia adreso)?
5. Ĉu via grupo laboras por nia movado nur lingve aŭ ĉu ĝi zorgas je la disvastigo de Esperantismo inter la studentaro de via altlernejo?
6. Kia estas la rilato de la unuopaj profesoroj al nia movado?
7. Kia estas via persona opinio pri la neceso kaj ebleco fondi Universalan Studentan Asocion Esperantistan?
8. Kiajn celojn ĝi devus laŭ via opinio sekvi?

Atendante vian baldaŭan respondon, mi restas kun Esperanto-salutoj samideane *M. Fenster*, stud. phil

Al ĉiuj okultistoj de la Nürnberga Kongreso.

En nia kongresa kunveno ni promesis sendi al tiuj partoprenintoj, kiuj aliĝis al nia movado, sciigojn pri la okultista movado kaj priskribojn de eksperimentoj.

Tiun ĉi promeson ni pro malsano inter la estrar-membroj kaj pro la terura subita senvaloriĝo de la germana mono bedaŭrinde ne povis plenumi.

La kotizoj, kiujn ni en Nürnberg ricevis, restis netuŝitaj kaj momente reprezentas valoron de 5.— germanaj ormarkoj. Tiu ĉi sumo ne sufiĉas por afranko, pli malmulte por papero kaj kovriloj.

Tial ni estus tre dankaj al ĉiuj okultistoj, se ili per alsendo de pliaj kotizoj al nia kasisto s-o Heinrich Goldmann, Charlottenburg, Pestalozzistr. 4, donus al ni la eblecon por multobligo kaj forsendo de la jam preta teksto.

S-o L. Gube, Berlin, Friedenau, Fregstr. 26, jam verkis parton de siaj okultistaj travivaĵoj, kiu estas preta por multobligo, sed, kiel jam dirite, mankas al ni por tiu ĉi celo la mono.

Kiam ni ricevos monajn subtenojn, tiam ni zorgos pri daŭra kuneco de ĉiuj interesuloj kaj donos pliajn komunikojn.

Kun samideana saluto por la Internacia Okultista Unuiĝo *Hildegard Nickel*,
Potsdam (Germanujo), Blücherplatz 2.

Radio-aŭskultantoj!

Respondo!

Mi ricevis tiel multnombrajn respondojn al mia peto, ke samideanoj skribu al mi pri la klopodoj aŭdi mian radioparoladon la 5 aprilo kaj pri ebla monda radio-ligo, ke mi tute ne kapablas, respondi al ĉiu. Tial mi petas ĉiun, kiu aprobas mondan radio-ligon, aliĝi al Internacia Radio Asocio, s-o Harry Epton, sekr., 17 Chatsworth Road, London, 5 E., se li jam ne faris tion. Kiam mi unue faris mian peton pri tiu afero, mi tiam ne sciis pri organizo de I. R. A. Plue, mi ricevis respondojn, ke oni aŭdis mian esperantan paroladon en Japanujo, Sud-Francujo, Germanujo, Ĉeĥoslovakio kaj Svedujo.

James Denson Sayers, New York.

Negocaj informoj.

Jam en pasinta numero ni atentigis niajn legantojn al la jus aperinta 200-paĝa libro en Esperanto „Eŭropo ĉe la Abismo". Al nia hodiaŭa numero estas aldonita speciala prospekto. Ĉiu interesato mendu tuj, antaŭ ol la provizo estos forvendita. La libro estas tre modele kaj moderne aranĝita, enhavas belan kuprogravur-bildon de la aŭtoro kaj estas tre malmultekosta kompare al aliaj Esperanto-libroj. Detalojn oni vidu el la anonco aŭ petu de la eldoneto: Frankfurter Societätsdruckerei, Abtlg. Buchverlag, Frankfurt a. M.

UEA bezonas dek-mil membrojn. - Aliĝu tuj!

Esperanto kiel internacia radio-lingvo.

Kunlaboru kaj varbu, abonu kaj anoncu je la peresperanta, poresperanta Internacia Radio-Revuo

Radio-Servo

ilustrita monata organo por la tutmonda Radio-industrio, -komerco, -tekniko, -scienco, -arto.

Interligilo por la Internacia Radio-Asociaro, por la Radio Kluboj kaj Radio-interesuloj de ĉiuj landoj kaj lingvoj.

Jara abonprezo por 12 numeroj: 1,25 dol. (po numero: 0 10 dol.) aŭ ties ekvivalento

Centra Oficejo kaj Eldonejo: ‚Radio-Servo', Locarno (Svislando).

Bank-Konto: Unione di Banche Svizzere, Locarno. Telegrafa adreso: Radio-Servo, Locarno.

Gaudencio Vazquez Sanchez
Komercisto, Nerva (Huelva), Hispanujo.

Akceptas reprezentadojn por tuta Hispanujo pri ĉiuj komercaĵoj kaj produktoj precipe de la en Hispanujo ne fabrikeblaj artikloj. :—: Mi havas reprezentantojn en Madrido kaj en multaj gravaj hispanaj ĉefurboj. :—: Laŭ deziro mi donas ĉiajn informojn senpage rilate al hispana merkato.

Egiptujo!
Internacia Esperantista Komerca Servo
reprezentas seriozajn firmaojn

Importas ĉiuspecajn produktaĵojn, entreprenas transitojn inter Port-Said (Suezkanalo) al Aŭstralio, Okcidenta Azio kaj Afriko, eksportas egiptajn produktaĵojn. Ĉiuj informoj. Garantio. Bonaj referencoj.

Katalogojn, ofertojn ktp sendu al
S-o Demetrius G. Joannides
Port Said
Box 98 Egiptujo

FOIRO DE GIJON - HISPANUJO
internacia kaj oficiala specimenfoiro
okazos de 15—31 aŭgusto
prezidita de lia reĝida moŝto Princo de Asturias.
Esperanto estas oficiala lingvo de la foiro.
Petu informojn en Esperanto kaj broŝuron de la foiroficejo
FERIA DE MUESTRAS ASTURIANA
Libertad 19 y 21
GIJON - Hispanujo
Oni ne pagos limimpostojn pro la specimenoj

60 famaj pentraĵoj el muzeo de „Louvre" en Paris.

Arteldonaĵo de s-o L. G. Patras laŭ formato 19×25 cm, kompilita de s-o Henri Verne, ĉefsekretario de la direkcio de la francaj naciaj muzeoj. - Lingva teksto en franca, angla kaj hispana lingvoj kaj en Esperanto.

Prezo: broŝurita 55 fr. fk.
kalikote bindita 65 fr. fk.
lede bindita 80 fr. fk.

Mendebla kontraŭ antaŭpago kun 4 fr. fk. por sendkosto. Ĉiu mendo ricevota kun la jena anonco favore nepagos la sendkoston. Sin turnu al s-o
Delanoue,
ĉefdelegito de UEA,
Paris XIV, 4 rue Charles Dinry.

Atentu kolektistoj!
Mi vendas maloftaĵojn de antikvaj moneroj kaj de papermono.
Interŝanĝo kaj vendo de novaj kaj malnovaj poŝtmarkoj.
Turnu vin tuj al
s-o Fritz Neumann,
Alter Markt 12, Emmerich (Rhein), Germanujo.

La plej malmultekosta libro en Esperanto
Ĉiu devas nepre posedi la libron
Eŭropo ĉe la abismo
de
Francesco Nitti
iama ministrara prezidanto itala
Esperanto-traduko
kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.
(Preskaŭ 290 paĝoj.)
Jus aperis.
Prezo 3.— ormarkoj.
Mendu tuj!
La livero al privatpersonoj okazos nur post antaŭa pago de la sumo de 3.— ormarkoj plus sendkosto de 20 ormenigoj po ekzemplero, nag bla en la valuto de la koncerna lando, transkalkulita je la kurso de la borso de Zürich (Revendistoj turnu sin pro specialaj kondiĉoj al la eldonejo)
Frankfurter Societäts-Druckerei G. m. b. H.
Abtlg. Buchverlag - Frankfurt a. M.
Korespondo en Esperanto. :—: Ilustritaj kartoj rifuzataj.

Legu la libron:

Milionoj da homoj nun vivantaj neniam mortos!

Ĉiu vera esperantisto estas idealisto kaj tial nepre devus posedi tiun ĉi broŝ. laŭ kies enhavo la plej ideala ora epoko de la homaro estas en krepusko dum la nuna kiza stato de la mondo, kiu estos sekvata de la plej bonaj kaj plej favorai imageblaj cirkonstancoj sur la tero. Ĉiuj klarigoj bazas sur la B bilo kaj ĝiaj profe ajoj por la Regno de Dio sur la tero. — Prezo 1.25 sv. fk. aŭ 1.— or. mk. — Mendu ĉe
Garda Turo, Biblio- kaj Traktat-Societo,
Esperanta Fako,
Landstr. 277.
Rieden bei Baden, Svislando.
Poŝtĉekkontoj: Aarau VI, 1905, Karlsruhe 70236.

Esperantistoj!
La malgranda
„GRUNDKA"
estas la skribmaŝino de ĉiu Esperantisto.
Tre solida - Duobla komutado
Aŭtomata kolorrubanda bobeno
Kaŭĉuka rulilo
Skribado lernebla en 1/2 horo.
Prezo nur 8 usonaj dolaroj!
Skribu al
Fred Falk, Auerbach in Hessen
Germanujo.
- Serĉas reprezentantojn en la tuta mondo. -

Se vi bezonas Esperantaĵojn
postulu la riĉenhavan katalogon de :-: niaj multe ŝatataj eldonaĵoj! :-:
(Lerno- kaj ekzercolibroj, vortaroj, literaturaj verkoj ĉiuspecaj, insignoj, propagandiloj ktp.)
Abonu nian gazeton Germana Esperantisto!
La plej malnova el ĉiui ekz. Esp.-gazetoj.
Ni liveras akurate kaj al ĉiuj landoj.
Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin SW 61, Wilmsstrasse 5 (Germanujo)

Hungara Esperanto Instituto
Eötvös u. 5, Budapest VI.
Mendu tuj la jenajn librojn:
Morgaŭ matene
de D-o Kalocsay,
Prezo: 0.20 dol.
Kriminologio
de D-o Rustem Vámbéry
Tradukita de D-o V. Toth.
Por juristoj interesa studaĵo, por kriminalistoj kaj policistoj tre taŭga lernolibro.
Prezo 0.40 dol.
En presado Madoch — D-o Kalocsay
„La tragedio de l'homo"
grandformata, pli ol 200 paĝa kun multaj ilustraĵoj. Mondfama kaj eterna perlo ne nur de la hungara literaturo, sed ankaŭ de la homaro. Por revendistoj rabato! Prezo: 0.80 dol. Aldonu por sendkostoj 20% p. eksterlando. 10% por enlando.

Kodo de Georges Lugagne
estas la plej bona kodo
7-lingva kun Esperanto-parto. :—: Prospekto havebla per
Société des Codes Télégraphiques Georges Lugagne
22 rue Pasquier. Paris (Francujo).

Laŭlege deviga teksto germanlingva: Verlag und Druck (Eldonejo kaj Presejo): T. & H. Jung, Horrem bei Köln. Verantwortliche Schriftleiter (Respondecaj Redaktoroj): Teo Jung kaj Rob. Kreuz, Horrem b. Köln.